



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Junio 2017 n-ro: 18



## Merhaba!

Haziran sayımızla gene sizinle birlikteyiz ve gene birbirinden ilginç ve önemli kişilerin yazıları var dergimizde. Bunlarda bazıları:

- Ünlü Bulgar yazar Julian Modest'in dergimize gönderdiği kısa hikayesi.
- Brezilyalı Herbert A. Welker'in nasıl Esperanto öğrendiğine dair yazısı.
- Ünlü Bulgar şair Venelin Mitev'in dergimize gönderdiği şiirleri.
- Yunanlı Esperantist Spiros Sarafian'ın Sisam adası ve antik Efpalino tüneli hakkındaki yazısı.
- Çok dokunaklı bir hikaye: "Sahipsiz köpek".

... ve daha bi çok başka yazı....

## Herkeseye iyi okumalar !

## Saluton!

Ni denove estas kune kun vi pere de la junia numero de nia revueto kaj denove en ĝi estas tre interesaj verkoj de gravaj Esperantistoj. Jen kelkaj el ili:

- La mallonga rakonto, kiun sendis la konata bulgara verkisto Julian Modest.
- La rakonto de brazila esperantisto Herbert A. Welker pri kiel li esperantistiĝis.
- La poemoj, kiujn sendis al nia revueto la bulgara esperantisto Venelin Mitev.
- La artikolo pri Samoso insulo kaj la antikva Eŭpalina tunelo verkita de la greka esperantisto Spiros Sarafian.
- La tre kortuŝa rakonto: "Hundo senmastro".

... kaj multe aliaj...

## Bonan legadon al ĉiuj!

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI

[www.CDELI.org](http://www.CDELI.org)

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

### TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com


Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Rapida Negoco	4
La kastelo de Kozano	5
Leterojn ni ricevis el geamikoj	5
Mia vojo al Esperanto	6
Perseo-greka mito	7
Tri poemoj de Venelin Mitel	8
Eŭpalina akvodukto	9
Koloroj el diversaj popoloj - Francujo	10
Statistikoj pri MONA Informado retejo	10
Hundo sen mastro	11
Poemoj de Rolan Platteau	12
La palmarboj flustras	13
Pri kio ridis Zamenhof?	13
Du ranoj	14
Kio ni estas kaj kion ni celas (5)	15
Dankon Amiko (5) - de Claude Piron	17
Tre grava novaĵo por eŭropaj esperantistoj	17
Mallonga Historio de Filozofio (17)	18
El la libro de "Dao de Jing" (11)	19
Ŝercoj	20
Kurĉvort-enigmo	20
Gramatiko - Lingvaj Respondoj (5)	21
En la regno de l' senfinaj mil unu vortoj	22
Uzblas sunenergio por aŭtobusoj en Ŝanhajo, Ĉinio	23
Tra la mondo fariĝas senpaga	24
Lancita poŝtelefona aplikaĵo Amikumu	24
Publika libroŝranko - la mikrolibrejo por ĉiu	25
La nigra katido	25
Esperanto Kurso (17)	26
Nova retejo por la MONA regiono	28
Fermo	28

## Kursoj



1) La kurso en la Lernejo Ŭskŭdar Amerikan Lisesi en Istanbulo daŭras.

2) La kurso por komencantoj en Kadikŭy distrikto ne okazas ĉijare.

3) La kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato ne okazas ĉijare.

4) Nova Kurso: En Erciyes Universitato de Kayseri urbo, 70 studentoj en la fako de Angla-instruisto, en la leciono de Lingvo akirado memlernas Esperanton kiel eksperimento pri kiel homoj lernas novan lingvon. Ĉu la bazo estas la denaska lingvo, aŭ ĉu iu alia dua lingvo ili jam lernis?

## Kultura Paĝo

[EsperantoTurkiye.wordpress.com](http://EsperantoTurkiye.wordpress.com)



## Esperanto Türkçe

@EsperantoTR



## Ni atendas leterojn de geamikojn



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

## Esperanto-Sumoo



La 46-a Esperanto Sumoo okazis inter la 7-a kaj 21-a de majo.

En tiu ĉi Sumoo la nombro de la partoprenantoj atingis 383, kiu estas la plej granda en la historio de la Sumoo, kaj la nombro de la landoj estis rekorde alta : 31 landoj el 5 kontinentoj.

El Turkujo partoprenis nur du luktistoj, kvankam ni havas la potencon de pli ol kvin partoprenantoj.

La statistikoj de la maja Esperanto-Sumoo ne estis pretaj en la tempo kiam ni preparis la junian revueton. Do la statistikojn ni anoncos en la venonta numero.

Jen la ekzemplero de la maja Sumoo diplomo:



<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl>

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/>

## UEA



N-ro 682 (2017-05-03)

**La Estraro traktis renovigojn en Roterdamo**

Nova

membrosistemo de UEA, kunlige kun nova datumbazo kaj nova retejo, estis unu el la paŝoj al modernigo traktitaj en la Estrara kunsido en Roterdamo, de la 21-a ĝis la 24-a de aprilo.

**Legu pli ĉe:**

<https://goo.gl/TCu112>

N-ro 681 (2017-04-29)

**UEA havos novajn retpaĝon kaj administran sistemon**

Post la retejoj [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net), [www.aktivulo.net](http://www.aktivulo.net), [www.zamenhof.life](http://www.zamenhof.life) kaj [www.revuoesperanto.org](http://www.revuoesperanto.org) la laboroj fokusiĝos al la novaj administra sistemo, membrospaco kaj al la retejo de UEA. La laboron faros Esperanta teamo kun merkatikisto, dezajnisto kaj komputilistoj, gvidata de komputilisto, Ana Maria da Costa Ribeiro.

**Legu pli ĉe:**

<https://goo.gl/Z4b8kz>

N-ro 680 (2017-04-14)

**La vivoverko de Zamenhof daŭre inspiras, 100 jarojn post lia morto**

La 14-a de aprilo 2017 estas la 100-a datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof, iniciatinto de Esperanto. En tiu ĉi solena tago, Universala Esperanto-Asocio ree substrekas la gravecon kaj daŭran valoron de lia vivoverko, pri kiu eblas nun legi en trideko da lingvoj ĉe la nova retejo [www.zamenhof.life](http://www.zamenhof.life).

**Legu pli ĉe:**

<https://goo.gl/BV6SW2>

## TEJO



**Malferma alvoko: Lernu senpage pri organizado de kampanjoj en**

**Hispanio**

Ĉu vi ŝatus partopreni senpage en la tria kunveno de la projekto pri alekstera komunikado ECY en Teruel (Hispanio) de la 26-a ĝis la 27-a de junio? La temoj estos organizado de kampanjoj kaj uzado de diversaj kanaloj por komuniki. La trejnado okazos la 26-an kaj 27-an de junio – vi devas alveni la 26-an kaj [...]

**Legu pli ĉe:**

<https://goo.gl/PK1gCL>

**Trejnadoj de TEJO dum Internacia Junulara Festivalo en Italio**

Dum IJF – Internacia Junulara Festivalo en Italio okazis trejnadoj de TEJO pri diversaj temoj: Tempo-mastrumado, Genra egaleco, Varbado per sociaj retoj, Motivado, Internacia Komunikado, Problemsolvado, Organizado de eventoj, Instruista trejnado. La trejnadoj estis la unuaj liveraĵoj de tiuj kiuj sekvis trejnadon por trejnistoj kadre de AEJK – Afrika-Eŭropa Junulara Kapabligo, subtenita de Erasmus+. La [...]

**Legu pli ĉe:**

<https://goo.gl/ggclIR>

**Olga Shiliaeva, nova komisiito pri Scienca kaj Faka Agado**

Kun granda ĝojo ni povas anonci ke ni havas novan komisiiton pri Scienca kaj Faka Agado: Olga Shiliaeva! Olga prezentas sin: Mi estas Olga Shiliaeva, esperantistino el Rusio. Laŭ profesio – ekonomiisto kaj instruisto en universitato. [...]

**Legu pli ĉe:**

<https://goo.gl/qgrTov>



Ĉiun matenon oĉjo Grozdan vekigis frue. Li havis bonan kutimon. Kiam la unuaj sunradioj, similaj al ora fasko, tuŝis la tegmenton de lia eta domo, li iris el la korto kaj kun sia hundo Atilo ekpromenadis. Proksime al la domo estis granda parko, kiu dronis en verdaĵo. Oĉjo

Grozdan kaj Atilo iradis sur unu el la padoj malrapide, trankvile kaj tiel trairis la tutan parkon. Li profunde enspiris la freŝan matenan aeron kaj ĉe li Atilo kuris tien kaj reen, saltis, kontenta, ke ili duope denove estas en la parko ĉe la verda mola herbejo kaj la altaj arboj.

- Ne estas pli grandaj amikoj en la tuta loĝkvartalo ol oĉjo Grozdan kaj Atilo – ŝercis la najbaroj.

Post la forpaso de onklino Katja, la edzino de oĉjo Grozdan, Atilo estis ĉiam ĉe li. Petro, lia filo, loĝis kun sia familio en unu el la foraj novaj loĝkvartaloj de la urbo kaj tre malofte vizitis la patron, sed oĉjo Grozdan ne sentis sin sola. Kun Atilo ili estis ĉiam kune. Li amis Atilon kiel sian infanon kaj la hundo certe sentis tiun ĉi amon.

Oĉjo Grozdan neniam forgesos malagrablan akcidenton, kiu okazis antaŭnelonge. Foje li riparigis la tegmenton de la barako malantaŭ la domo, en kiu estis la lignoj kaj terkarboj por la vintra hejtado. Li staris sur la malnova ligna ŝtuparo, sed subite la ŝtuparo moviĝis kaj oĉjo Grozdan falis. Forta doloro tranĉis lian maldekstran kruron. "Mi rompigis ĝin, diris al si oĉjo Grozdan." Li provis ekstarigi, sed ne sukcesis kaj restis kuŝi senhelpa sur la grundo. Proksime estis neniuj. Eĉ se li ekkrius, neniuj aŭdis lin. La najbara domo estis malproksime de lia domo. Oĉjo Grozdan kuŝis, premis dentojn pro doloro kaj rezonis kiamaniere li rampu al la domo. Post dek minutoj li ekprovis rampi, sed vane. Nur du metrojn li sukcesis ventre rampi, sed liaj fortoj elĉerpiĝis. Li restis kuŝi senespera, sentanta akran doloron. Subite al li proksimiĝis Atilo. Verŝajne iel la hundo eksentis, ke kun lia dommastro okazis io malbona. Atilo ekstaris ĉe oĉjo Grozdan kaj proksimiĝis kapon al lia kapo. Li ĉirkaŭbrakis Atilon kaj la hundo komencis malrapide

tiri oĉjon Grozdan al la hejmo.

Li ne memoris kiom da tempo rampis kun Atilo, sed ili duope sukcesis iri al la pordo de la domo, eniri kaj oĉjo Grozdan telefonis al Petro, la filo, kaj al malsanulejo. La filo venis kaj venis la ambulanco, kiu veturigis oĉjon Grozdan al malsanulejo.

La kruro de oĉjo Grozdan resaniĝis, sed li neniam forgesos la helpon de Atilo. Nun li kaj la hundo denove promenadis en la parko kaj kune pasigis horojn kaj tagojn. Oĉjo Grozdan parolis al Atilo kiel al homo, la hundo rigardis lin senmove per siaj grandaj humidaj okuloj, kvazaŭ komprenis ĉiujn liajn vortoj.

lun tagon, tute neatendite venis Petro. Oĉjo Grozdan ekĝojis kaj ekstaris renkonti lin.

- Saluton – diris la maljunulo. – Mi ne kredas, ke vi venis viziti min. Kiel vi fartas? Kiel fartas via edzino kaj la infanoj?

- Ĉiuj ni fartas bone – repondis Petro, - sed mi tre rapidas kaj ne povas resti pli.

- Kio okazis? Kial vi tiel rapidas? – miris oĉjo Grozdan.

- Feliĉe aperis bona negoco kaj mi ne devas preterlasi ĝin. Vi scias, ke mi bezonas monon, tamen vi ne povas doni al mi, ĉar via pensio estas ege malgranda. Iu konato deziras aĉeti Atilon kaj mi venis preni ĝin.

- Kiel! Ĉu vere vi vendos ĝin? – ne povis kredi oĉjo Grozdan.

- Jes, mi vendos ĝin. Mi bezonas monon!

Kaj Petro sen pluraj klarigoj ligis Atilon per rimena rubando kaj kondukis ĝin al la aŭto. Oĉjo Grozdan staris senmova, kiel fulmofrapita arbo, kaj nur rigardis Petron, kiu rapide malproksimiĝas kun Atilo.

**Julian Modest, Bulgarujo**

\* \* \* \* \*

***Estas granda honoro aperigi ĉi tiun belan rakonton senditan de Julian Modest por nia revueto. Ni dankas al li!***

## La kastelo de Kozano



La Kastelo de Kozano en Adana urbo, estas konstruita sur kruta monteto kaj rigardadas al la tuta areo ŝajne ĝi ankoraŭ protektas la regionon. El la kastelo videblas la apudaj du aliaj kasteloj Yılankale (Serpent- Kastelo) kaj Anavarza

kasteloj kaj en klara vetero eĉ videblas la Mediteraneo maro malgraŭ ke ili ĉiuj estas multaj kilometroj for de la urbet de Kozano.


Supreniri piede aŭ surĉevale al tiu monteto - kiu estas krurungo de Taŭro-Montoj - estas malfacila; do tiuj, kiuj volis konkeri la kastelon devis pensi dufoje ĉar soldatoj devis alproksimiĝi al ĝi dume illa kastelanoj - plej eble arbalestistoj - atakis ilin el la tursuproj.

## Mehmet Fatih Yüce

Historiistoj ne povas konsenti pri kiam la kastelo estis konstruita aŭ pri kiu konstruis ĝin. Kelkaj pledas ke ĝi estas faraĵo de Asiroj, dum aliaj datigas ĝin al la Hitita periodo. Sed preskaŭ ĉiuj historiistoj konsentas, ke ĝi estis reĝa rezidejo de Armena Reĝo de Kilikio kaj sidejo de Armenaj Patriarkoj. La postrestaĵoj de preĝejo ĉe la piedo de la monto devas esti el ĉi tiu periodo.

Nuntempe, postvivas ĉefe la ruinoj de la kastelo sed oni facile povas diveni - eĉ per unu rigardo al ĉi tiuj ruinaĵoj - ke ĝi iam estis grandega kaj belega konstruaĵo. La kastelo estas vizitata ne nur por ĝiaj ruinaĵoj sed ankaŭ por spekti la vastan ĉirkaŭaĵon el la montsupro.

## Mehmet Fatih Yüce, Adana, Turkujo



## Leterojn ni ricevis el geamikoj



Kara amiko, Koran dankon pro la nova numero de "Turka Stelo". Ĝi estas tre interesa, alloga kaj tre plaĉa. Nun mi sendas al vi mian mallongan rakonton "Rapida negoco". Mi esperas, ke ĝi taŭgas por "Turka Stelo". Kore via,

**Georgi Mihalkov, el Sofio, Bulgarujo**



Estimata Redaktoro! Tre plaĉas al mi kaj la grafika prezento kaj la enhavo de via revuo. Mi sendas poemeton de mi skribitan. Jen ĝi:

### Vivemo

"Maljuna saliko riverborde staras,  
Tuta ĝia trunko interne jam kavas,  
Printempe kreskigis tamen etan branĉon.  
Al mi ĝi instruas de naturo saĝon:  
Eĉ se proksimiĝas jam al ĝia fino,  
Kara estas ĉiu tago de la vivo."

**Lenke Szász, el Parajd, Rumanujo**



Saluton kara amiko, Elkoran dankon pro la alsendo de via belega kaj bonega revuo!

Ankaŭ mi dankegas la aperigon de miaj poemetoj! Estas granda honoro! Mi varme gratulas vin pro via altvalora laboro favore al Esperanto. Amike,

**Maria Nazaré Laroca, el Juiz de Fora, Brazilo**



Kara kaj tre estimata amiko, Mi elkore dankegas vin daŭre sendi al mi helan Turkan Stelon. Certe mi ŝatos skribi artikolojn pri la Kulturoj de Sudaziaj landoj. Bonvolu akcepti miajn elkorajn bondezirojn. Frate via.

**Mian Salam SHANY, el Pakistano**



Saluton estimataj, mi nomiĝas Uwe Stecher kaj loĝas en Vieno, Austrio; mi estas en la estraro de la Austria E-Federacio. Hazarde mi ricevis ekzempleron de via gazeto: gratulegon, ĝi estas treege leginda kaj bela! Do mi volas peti al vi, ke vi sendas ĝin elektronike en regula maniero. Ĉion bonan kaj dankegon!

**Uwe Stecher, el Vieno, Aŭstrio**

## Mia vojo al Esperanto

Kiam iu esperantisto kandidatiĝas al iu posteno en UEA, li/ŝi devas skribi – kaj eble en intervjuo paroli – pri siaj konoj kaj spertoj en Esperanto. Poste oni kelkfoje diskonigas en la revuo Esperanto aŭ en la retejo de UEA kelkajn tiajn informojn pri la homo kiu estis elektita. Ekzemple pri la estraranino Sara (aŭ Maria Rosaria) Spanó oni informis, ke ŝi eklernis Esperanton fine de 2007 kaj pli kaj pli aktivis loknivele. Pri la redaktoro de Esperanto, Attila Kaszás (kiu restis nur unu jaron en la posteno), legeblis:

Lerninto ĉe la fama kvintaga "Piratfiŝkurso" en 1987, Kaszás tuj aliĝis al la E-Fako de la Universitato ELTE en Budapeŝto, kaj fariĝis tre aktiva en la junulara movado de la 90-aj jaroj. Estrarano de Hungara E-Junularo kaj TEJO, li kunorganizis multajn junularajn renkontiĝojn kaj trejnseminariojn, rolante kiel la LKK-prezidanto de la 55-a IJK. Dum la renkontiĝoj li ofte verkis kaj reĝisoris humorajn skeĉojn kaj kunredaktis eldonaĵojn. Poste li fondis E-familion, en kiu naskiĝis unu filo.

Nun estis elektita "nova redaktoro-paro": Dima Ŝevĉenko (31) kaj Anna Striganova (29). Pri ili la UEA-retejo informas, ke Dima estas denaska esperantisto kaj ke liaj diplomverkoj ĉiam rilatas al Esperanto. Ambaŭ "estas aktivaj en la moskva Esperanto-movado, kie ili organizis plurajn popularajn aranĝojn. Ili kunlaboras ankaŭ pri instruado de Esperanto en diversaj medioj".

Ĉion tion mi konsideras tre interesa, sed mi ŝatus scii pli pri la lernado de Esperanto de tiuj funkciuloj (nur pri Dima Ŝevĉenko la afero estas klara: li estas denaska esperantisto).

Mi povas imagi, ke ankaŭ la legantoj de la Esperanta Retradio iomete interesiĝas pri tio, kiel kaj kiam la kunlaborantoj de ERR lernis Esperanton kaj kion ili (t.e. ni) faris kaj faras pri kaj en la internacia lingvo.

Rilate al mi: antaŭ preskaŭ unu jaro mi jam donis kelkajn tiajn informojn. Nun mi ripetas ilin kaj aldonas aliajn.

Mi eklernis Esperanton memstare antaŭ ĉirkaŭ 25 jaroj, pro du kialoj: ĉar mia edzino lernis ĝin, kaj ĉar mi – instruisto de lingvoj – volis koni tiun artefaritan lingvon. Sed mi lernis nur la bazajn regulojn kaj legis nur kelkfoje kelkajn mallongajn tekstojn, ĉefe en la revuo Esperanto. Vere mi ne interesiĝis pri la internacia lingvo – aŭ mi ne havis tempon interesiĝi pli. Mi ne aŭskultis nek skribis nek parolis la lingvon. Sed – kiel ĉiuj scias – ni okcidentuloj (specife tiuj kiuj parolas latindevenajn lingvojn) povas kompreni skribitajn tekstojn relative facile, ĉar la E-vortprovizo

baziĝas grandparte sur la latina. Tiel mi eĉ sukcesis legi libron, kiun mi trovis en nia librobretaro (La Monto, de István Nemere). Hodiaŭ mi vidas, kiujn vortojn laŭŝajne tiam mi ne sciis kaj serĉis en iu vortaro. Estis io, kio tre plaĉis al mi: malkovri vortojn, kiujn mi konis en la germana, franca kaj angla.

Kvankam mi ne dediĉis min al Esperanto, mi apogis ĝin, kiam esperantistino volis doni fakultativan kurson de Esperanto en la Universitato de Braziljo, kaj kelkajn jarojn poste, kiam alia instruisto de Esperanto faris la samon. Cetere tiu instruisto daŭre donas tiajn kursojn.

Finfine mi komencis dediĉi min al Esperanto, kiam – jam emerita profesoro – mi akceptis fine de 2013 la proponon de mia edzino partopreni en la Universala Kongreso de 2014 en Bonaero. Tiam mi komencis legi kaj eklerni pliajn gramatikajn regulojn, aŭskulti esperantajn tekstojn (mi malkovris la retejon Esperanta Retradio komence de 2014) kaj mi skribis miajn unuajn etajn retmesaĝojn. Mi ankaŭ legis pri Zamenhof kaj la movado kaj faris portugallingvan prelegon por diskonigi Esperanton en la Teozofia Societo (kie mi estas membro). Tiu prelego ("Esperanto, Homaranismo e Teosofia") – kiu donas ĝeneralan superrigardon pri Esperanto – nun estas en Jutubo.

Dum la UK mi trapasis la KER-ekzamenon je nivelo B2, kaj iomete post la UK mi komencis kunlabori en la Esperanta Retradio. Mi ankaŭ tradukis tekstojn pri Teozofio el la angla en Esperanton kaj kreis fine de 2014 la retejon "Teozofio Esperante". Krom la kunlaboro en ERR mi konsideras nun kiel mian specifan taskon diskonigi Esperanton inter teozofiistoj (kaj ankaŭ ĝenerale) kaj Teozofion inter la esperantistoj. Se oni akceptas la tiel nomatan "internan ideon" de Zamenhof, la du movadoj havas kiel celojn la fratecon inter ĉiuj homoj, solidarecon, pacon.

Hodiaŭ mi tre bedaŭras ne esti dediĉinta min pli frue al nia mirinda, belega, eksterordinara internacia lingvo.

**Herbert A. Welker, Brazilo**

Vi povas aŭskulti la artiklon en la jena ligilo:

<http://esperantaretradio.blogspot.com.tr/2017/03/mia-vojo-al-esperanto.html?view=flipcard>

## Perseo - greka mito (1/3)

Al la reĝo Akrisio profetis iam orakolo, ke la propra nepo mortigos lin. La reĝo timis pri sia vivo kaj pensis pri tio kiel malhelpi tion. Li kunvokigis ĉiujn siajn laborsklavojn kaj ordonis al ili, ke ili fosu sub la reĝa burgo kelon kaj poste fermu ĝin per fera pordego. En la volbaĵon li kondukis sian filinon Danao kaj fermis la pordegon zorgeme. Li sendis nutraĵojn en ŝian prizonon, sed ne ellasis ŝin, por ke la terura profetaĵo neniam plenumiĝu.



La lamentoj kaj ĝemoj de la enprizonigita reĝa filino penetris ĝis la oreloj de la dia patro. Zeŭso kompatis la solan knabinon, grimpis en formo de ora pluvo en la kelon kaj heligis la subteran tenebron. Li enamiĝis je la bela Danao, kaj ne daŭris longe ĝis la principidino naskis knabeton. Ĝi ricevis la nomon Perseo.

Iam promenis reĝo Akrisio en la burga korto kaj aŭdis la larmadon de infano. Unue li pensis, ke ĝi estas la vento, kiu hurlas ĉirkaŭ la burgaj turoj. Sed la plorado venis el la tero. Plena de surprizo kaj teruriĝo kuris Akrisio al la fera pordego kaj malfermis la kelon. Plorante Danao ĵetiĝis al la kolo de la patro kaj petis indulgi la etan Perseon kaj ŝin mem. La reĝo puŝis ŝin de si kaj rapidis en la burgon. Li tro timis la morton por havi kompaton.

Li ordonis al la gardistaro meti la filinon kaj la nepon en grandan keston, fermnajli ĝin kaj ĵeti la keston en la maron. Obeeme la gardistoj plenumis la ordonon. Antaŭ ol la tago pasis, la maraj ondoj forportis la keston, en kiu sidis la malfeliĉa Danao kun la malgranda Perseo sur la brakoj. Tra fendo en la kesto ŝi vidis nenion krom la ondantan maron kaj la ŝaŭmon sur la krestoj de la bluaj ondoj.

La vespero krepuskiĝis kaj la kesto drivis ankoraŭ sur

la senfina akvo, kirloj turnadis, kaj la vento drivigis ĝin al fremda bordo. Post maltrankvila timplena nokto aperis je la horizonto insulo, ĝi kreskis kaj proksimiĝis. La vento pelis la keston rekte al ĝi.

Ĉe la bordo de la insulo fiŝistoj ĝuste pretigis siajn retojn por kaptado; jen ili ekvidis sur la ondoj strangan aĵon. Rapide ili saltis en siajn boatojn kaj tiris la keston sur sablan grundon. Scivolaj pri tio, kian trezoron la kesto entenas, ili rapide deŝiris la kovrilon kaj rigidiĝis pro miro. El la kesto grimpis bela juna ino kun dormanta knabo sur la brakoj. Pala kaj tremanta pro la longa suferado kaj la frido, ŝi dankis al siaj savantoj kaj raportis al ili, kiu sorto kondukis ŝin tien.

La kompatemaj fiŝistoj miris kaj donis al la ino kaj al la infano ion por manĝi kaj trinki. Kiam la savitoj iom trankviliĝis kaj rekolektis fortojn, kondukis ilin la plej maljuna fiŝisto en la urbon al la reĝo de la insulo.

La reĝo ofertis al la reĝa filino kaj al ties filo gastamikecon. Tiel vivis Danao kaj Perseo en la reĝa burgo kaj mankis nenio al ili. Post certa tempo la reĝo edzinigis ŝin kaj Perseo plenkreskis en la palaco kiel reĝa filo.

Ondo post ondo ruliĝis transmaren kaj jaro post jaro pasis en la insula regno. Jam delonge Perseo ne plu ludis en la herbejo de la ĝardeno, sed li ekzercis sin en vetkonkursoj kun aliaj junuloj, li rajdadis kaj ĵetadis la lancon. Maltrankvile la reĝo observis kiel Perseo fariĝas pli kaj pli forta, li timis pri sia trono. La plej bona estus, li konsideris, se Perseo vagadus tra la mondo. Tial li rakontis al li pri drakoj kaj gigantoj kaj heroaj agoj. Perseo aŭskultis tion kun entuziasmo.

„Ekzistis multaj famaj herooj“, rakontis la reĝo, „sed neniu el ili ĝis nun kuraĝis preni kiel predon la kapon de Meduzo.“

„Kaj kio estas tiu Meduzo?“ demandis Perseo. „Tre profunde en la okcidento“, diris la reĝo, „tie, kie la eterna nokto komenciĝas, vivas tri fratinoj, la gorgonoj. Ili estas flugilitaj monstroj kiuj havas anstataŭ hararo serpentojn. Du el ili estas nemortemaj kaj la tria mortema. La mortema gorgono nomiĝas Meduzo. Se iu rigardas al la rigida abomeninda vizaĝo de unu el la gorgonoj, tiu fariĝas ŝtono.“

Se mi havas la kapon de Meduzo, mi devus nur montri ĝin al la malamikoj kaj tuj ili fariĝus ŝtonaj kaj mi

gajnus ĉiun batalon.“

De tiu interparolado Perseo pensis pri nenio alia ol pri la gorgonoj. Logis lin entrepreni aventuron, kiun ankoraŭ neniu heroo kuraĝis entrepreni. La longa vojaĝo ne timigis lin. Kaj se Meduzo efektive estas mortema, tiukaze li povus venki ŝin per akra glavo kaj fortaj brakoj. Perseo ne pensis pri la danĝero, sed nur pri sia venko.

„Mi vagos tra la mondo“, li diris al la patrino, post kiam li ĉion konsideris, „mi vagos tra la mondo kaj alportos la kapon de Meduzo.“

La patrino eklarmis. Ŝi timis, ke Perseo ne revenos de la danĝera vojaĝo. Sed la reĝo laŭdis la decidon de Perseo kaj gloris ties forton kaj kuraĝon. Por si mem li ĝojis pri la adiaŭo de Perseo.

Perseo ne hezitis. Li pretigis sin por la vojaĝo kaj tuj survojiĝis, plena de avido pri la aventuro. La subiranta suno montris al li la vojon. Li veturis trans maron kaj vagis tra kontinento. Li kreis al si vojon tra grandegaj arbaroj plenaj de bestoj kaj de birdoj, li grimpis trans montarojn kaj transiris riverojn. Dum tre longa tempo li

migris plu kaj plu ĉiam en la direkto de okcidento.

La diino Palas Atena observis lin dum ties vojaĝo. Ŝi ĉiam protektis la kuraĝulojn, kaj la kuraĝo de Perseo plaĉis al ŝi. Ŝi aperis antaŭ Perseo kaj diris al li: „Vi estas kuraĝa, Perseo, sed nur kuraĝo ne helpas al vi. Vi devas scii, kiel vi devos konduki por reveni vivanta kaj sana. Mi donos al vi konsilon. Vi ne rajtas rigardi la gorgonojn. Sed vi apenaŭ povus batali kun Meduzo, se vi ne rigardus ŝin. Tial mi donacas al vi protektŝildon el erco. Ĝi radias kiel spegulo kaj vi bone vidos la gorgonojn sur ĝi. Ties spegulfoto ne povus damaĝi al vi. Per kutima glavo vi ne povos detranĉi la kapon de Meduzo, tial prenu tiun ĉi ŝtalan serpon. Sed antaŭ ĉio alia vi devos gajni de la nimfoj flugilitajn ŝuojn, sorĉosakon kaj kaskon, kiu faras senvidebla.

Perseo dankis al la diino, li prenis la radiantan ŝildon kaj la serpon kaj iris tien, kien ŝi montris al li.

(daŭrigota)

Vi povas aŭskulti tiun ĉi artikolon en la jena ligilo:  
<http://esperantaretradio.blogspot.com.tr/2017/03/perseo-greka-mito-13.html>

## Tri poemoj de Venelin Mitev



### EN ĈI TIU TENERA, MISTERA VESPERO

En ĉi tiu tenera, mistera vespero  
ĉirkaŭ ni, super ni  
sonas milde, leĝere, libere  
la stel-somfoni'

Kaj ni marŝas laŭ la bordo de l' maro  
inter sablo kaj ŝaŭmo, ni – feliĉa am-paro.  
La ondoj forviŝos niajn spurojn en la sablo,  
la vento forblovos la ŝaŭmon bolantan.  
La bordo kaj la maro  
miljaron post ni restos.

### ETERNA DEMANDO

Ĉu ankaŭ vi cerbumas pri l' respondo  
al la demand' eterna en la mondo:  
La vivo kio estas, kaj kio fakte post ni restas?  
Mi jam komencas kompreni la saĝecon  
kaj la silenton de l' maristoj oldaj  
sidantaj ĉe pokaloj da malnova, peza vino:  
Eternaj estas la havenoj,  
la ŝipoj, ve, ne estas.

### ĈIO MALAPERAS IUN TAGON

Ĉio malaperas iun tagon.  
Oni forgesas revojn, rememorojn.  
Kaj silentiĝas amoj kaj tristecoj.  
Foriras la virinoj neamataj.  
Subiras sunoj kaj amikoj.  
Sekiĝas larmoj kaj riveroj.  
Degelas glaciarioj kaj malamikecoj.  
Ekdronas ŝipoj kaj havaĵoj.  
Kaj falas eĉ la plej belegaj steloj.

Iun tagon ĉio malaperas.

Krom  
la vojoj, kiuj kuras al la nekonataj horizontoj,  
kaj la soifo vidi  
kio kaŝas sin malantaŭ la vojturno.

Venelin Mitev, Bulgarujo



## Eŭpalina akvodukto



Samoso estas unu el la plej belaj kaj pitoreskaj grekaj insuloj, posedanta ĉiajn ĉemarajn kaj montajn belaĵojn, la konatajn en la tuta mondo, naturajn karakterizaĵojn de Grekujo.

Samoso estas konata pro sia nuntempa turisma valoro, sed ankaŭ pro sia glora antikva historio, precipe pro tio, ke ĝi estas la naskiĝloko de Pitagoro, la mondkonata antikva filozofo kaj matematikisto.

En la esperantista mondo Samoso estas konata kiel la unua kaj ĝis nun la sola lando de la mondo, en kiu, laŭ oficiala regna decido kaj ŝtata dekreto, Esperanto estis instruata en ĉiuj lernejoj de la elementa kaj meza eduknivelo, kiel deviga leciono.

Tio okazis en 1910, kiam Samoso estis sendependa greka teritorio, sub la povo kaj regado, pere de greka princo-reganto, de la otomana imperio, kaj estis frukto de daŭra agado de la distinginda samosa medicinisto d-ro Anakreono Stamatiadis, la fondinto de la esperantista movado en Grekujo.



Sur la insulo estis trovitaj kaj elfositaj tre interesaj antikvaj monumentoj, skulptaĵoj, sanktejrestaĵoj k.s., sed la plej impresa estas la tute savita unika antikva, subtera akvodukto, nomata Eŭpalina Akvodukto, el la

nomo de la konstruinto, la inĝeniero Eŭpalino.

La akvodukto estis farita meze de la 6a jarcento a.K. kaj estis uzita senĉese dum 1110 jaroj.

Temas pri unu el la plej interesaj atestoj de la homa konstruopovo, ekde 1992 inkludita en la katalogon de la monumentoj de la Internacia Heredaĵo de UNESCO.

Sub monteto 225 metrojn alta, oni traboris de ambaŭ flankoj la montajn rokmasivojn kaj faris 1036 metran tunelon kun diametro de 1,80 X 1,80 metroj.

La akvodukto de Eŭpalino estas treege grava teknika atingo kaj ties traborado estis efektiva, por la unua

fojo en la historio, laŭ bazaj matematikaj kalkuloj kaj helpe de simplaj mezurorganoj. Tial, ĝi estas unu el la plej gravaj teknikaj verkoj de la antikveco.

Oni supozas, ke celo de la tunelo estis ne nur la transportado de akvo, de fonto troviĝanta malantaŭ la monto, al la ĉefurbo de la insulo (hodiaŭa Pitagorio), sed ankaŭ la zorgo, ke estu nevidata kaj tiele nekonata kaj nedetruibla de malamikaj atakantoj kaj eventualaj sieĝintoj, la vojo de la akvo al la urbo.



Mirinda estas tio, ke la traborado estis komencigita samtempe de ambaŭ flankoj de la traborita monteto, de la norda kaj de la suda, kaj ke la du skipoj renkontiĝis, preskaŭ tute ĝuste, proksimume en la mezo de la tuta trauro. La kalkuloj de Eŭpalino pruviĝis tute ĝustaj!

Ne estas konata la nombro de la laborantoj, tamen la tuta laborado daŭris 8-10 jarojn, en tempo rekorda, se oni konscias, ke tiam oni laboris per martelo kaj ĉizilo kaj uzis por la lumigo de la tunelo oletorĉojn.

Notinde, ke tiu mirinda monumento estas tute savita, taŭge konservita kaj vizitebla en la tuta itinero.

La bonsortaj vizitantoj, surprizite ĝuas la kolosan kaj valoran faritaĵon, kiu havas aĝon de preskaŭ 3000 jaroj, ili mem spertas la unikan etoson, propraokule vidante sur la roksurfacoj la spurojn de la antikva, miraklofara ĉizilo, kiuj ŝajnas tute freŝaj.

**Spiros Sarafian** (Ateno, Grekujo)





Oni supozas, ke la tradicio de donaco de "konvalo" naskiĝis dum la mezepoko. la nomo de la floro tiam estis "lilio de valo" sed ĝi estis japan-devena nomo. Konvalo ĉiam simbolis printempon; la Keltoj atribuis al ĝi feliĉopovon.

La 1-an de majo 1561 la franca reĝo Karlo la 2-a, kiu jam antaŭe estis ricevinto de konvalo, decidis disdoni ĉiujare konvalovergetojn al la reĝokortaj damoj. Tiel naskiĝis la tradicio.

Sed poste alia grava afero alvenis al Francujo. Sekve de la malbonaj eventoj en Ŝikago (Usono) kiam laboristoj postulis kvintagan semajnon, la 2-a Socialista Internacio kunvenis en 1889 en Parizo dum la Internacia Ekspozicio - ĝi esti la centjara jubileo de la fama Franca Revolucio en 1789.

La kongresanoj celis akiri la saman kvardekhoran laboremajnon kiel en Usono kaj decidis ke ĉiujare, la 1-an de majo, la laboristoj manifestacios por ke la labortago ne superu 8 horojn. Sed la 1-an de majo en Fourmies, urbeto de norda regiono en Francujo, soldatoj pafis la pace marŝantajn laboristojn, ĉefe ministrojn. El la dek mortpafitoj, ok estis junuloj malpli ol dudek unu jaraĝa.

Tiu terura okazaĵo skuis la eŭropan laboristan klason. Ekde 1890 la manifestacioj alpinglis ruĝan triangulon sur siaj brustoj, kiu simbolis la tri partojn de la labortago: "laboro, hejmo, ka

libertempo". En 1907, en Parizo, la konvalo, la simbolo de printempo en la regiono (insulo de Francujo = Parizo kaj ĝia granda ĉirkaŭaĵo) anstataŭis la eglanterion, kiu estis uzita kun la ruĝa triangulo.

Post la unua mondmilito la postuloj iĝis diversaj pri la laborkondiĉoj. La 23-an de aprilo en 1919 la registaro permesis la okhoran labortagon; la venonta 1-a de majo ne estis labortago. Kaj oni ekkutimis alpingli la konvalo-vergeton ĉe la butontruo kun ruĝa rubando.

La 24-an de aprilo en 1941 mareŝalo Pétain deklaris tiun ĉi tagon kiel "laborfesto" senlabora sed senpagita tago, por ke laboristoj subtenu la registaron "de Vichy", kiu submetis Francujon al Hitlero. Sed dank'al la postmilita registaro, en la 27-an de aprilo 1947, tiu tago fariĝis salajrita.

sendis Jocelyne Monneret el Francujo



Statistikoj pri Mona Informado retejo

(Rigardu lastan paĝon)



Vid-kvantoj de paĝoj de la nova MONA Informado retejo el MONA landoj en preskaŭ nur unu monato.

	Armenio	95		Kuvajto	5
	Turkujo	48		Libano	5
	Maroko	36		Algerio	4
	Egipto	29		Tunizio	2
	Irako	25		Azerbajĝano	1
	Israelo	24			303
	Kartvelujo	18			
	Barejno	11			

<https://monainformado.wordpress.com/>

(Por pli da detaloj pri tiu retejo bonvolu rigardi la lastan paĝon de nia revueto)

## Hundo sen mastro



Viro mortis, kaj post lia morto neniu prizorgis lian nigran hundon. La hundo longe kaj amare funebris pri li. Ĝi tamen ne kuŝiĝis por morti sur la tombo de sia mastro, eble pro tio ke ĝi ne sciis kie tiu troviĝas, eble ankaŭ pro tio ke ĝi esence estis hundo juna kaj

gaja, kiu ankoraŭ ŝajnis havi konton por reguligi kun la vivo.


Troviĝas hundoj duspecaj: tiaj kun mastro, kaj tiaj sen mastro. Laŭ la eksteraĵo tiu distingo ne gravas; senmastra hundo povas esti same grasa kiel la aliaj, ofte eĉ pli grasa. Ne, la diferenco troviĝas aliloke. Por hundo la homo signifas eternon, providencon. Mastron obei, sekvi, fidi: jen por tiel diri la senco de hunda vivo. Estas vere, ke ĝi ne dum ĉiu minuto de la tago pensas pri sia mastro, kaj ke ĝi ne ĉiam akompanas lin ĉekalkane; ne, ĝi ofte vagas tute sola kun afereca mieno dum ĝi priflaras domangulojn, ligas rilatojn kun siaj samspeculoj kaj kaptas oston, se tiel eblas, kaj zorgas pri multo; tamen en la momento kiam ĝia mastro fajfas, ĉio ĉi malaperas el ĝia hunda cerbo pli rapide ol kiel skurĝaj batoj elpelis la vendistojn el la templo; ĉar ĝi scias, ke unu afero estas necesa. Kaj ĝi forgesas sian domangulon kaj sian oston kaj siajn kompanojn kaj rapidas al sia mastro.

Tiu hundo, kies mastro mortis en maniero kiun la hundo ne sciis, kaj estis entombigita en loko kiun la hundo ne konis, dumlonge funebris pri li; sed kiam pasis tagoj kaj nenio okazis, kio povus memori ĝin pri la mastro, ĝi forgesis lin. En tiu strato, kie ĝia mastro iam loĝis, ĝi ne plu flaris la odoron de liaj spuroj. Kiam ĝi ludis sur herbejo kun amiko, ofte fajfo tranĉis la aeron, kaj sammomente la amiko malaperis kiel vento. Tiam ĝi streĉis la orelojn, sed neniu fajfo similis tiun de ĝia mastro. Do ĝi forgesis lin, kaj ĝi forgesis ankoraŭ ion: ĝi forgesis ke ĝi iam havis mastron. Ĝi forgesis, ke iam ajn estis tempo, kiam ĝi ne konsiderus ebla por hundo vivi sen mastro. Ĝi iĝis hundo pri kiu direblus, ke ĝiaj bonaj tagoj forpasis, kvankam nur en senco interna, ĉar pri mondaĵoj ĝi sufiĉe prosperis. Ĝi vivis tiel, kiel hundo povas vivi: ĝi foj-foje ŝtelis bonan tagmanĝon sur la vendoplaco kaj

ricevis bastonadon, kaj havis amaferojn, kaj kuŝiĝis por dormi kiam ĝi laciĝis. Ĝi akiris amikojn kaj malamikojn. Lutage ĝi zorge tanis la haŭton de hundo pli malforta, alitage ĝi mem estis grave taŭzita de alia, pli forta. Frumatene oni povis vidi ĝin kuri malsupren laŭ la strato de sia mastro, kie ĝi pro kutimo ankoraŭ plej ofte restadis. Ĝi kuras rekte antaŭen kun mieno kvazaŭ ĝi havus ion gravan por plenumi; pasante priflaras hundon renkontatan, sed ne zorgas daŭrigi la konatiĝon; poste ĝi rapidiĝas, sed subite sidiĝas por grati sin malantaŭ orelo kun flamiĝanta energio. En la sekva momento ĝi eksaltas kaj flugas trans la straton por peli ruĝan katon tra kela truo, post kio ĝi kun rekonkerita mieno afereca pluiras sian vojon kaj malaperas post domangulo.

Tiel pasis ĝia tago, kaj jaro proksime spursekvis jaron, kaj ĝi maljuniĝis sen tion rimarki.

Poste do alvenis vespero nuba. Estis humide kaj malvarme, kaj iam-tiam ekpluvis. La maljuna hundo dum tuta tago vagadis longe for en la urbo; ĝi malrapide supreniris la straton, ĝi iomete lamis; foj-foje ĝi haltis por skuegi sian nigran felon, kiu kun la jaroj grizmiksiĝis ĉirkaŭ la kapo kaj kolo. Laŭ sia kutimo ĝi flaris jen dekstre, jen maldekstre; poste ĝi deviis sub pordegan volbon, kaj kiam ĝi revenis el tiu, alia hundo ĝin akompanis. Sekvamomente aperis ankaŭ tria. Ili estis hundoj junaj kaj ŝercemaj, kaj ili volis logi ĝin al ludado; sed ĝi estis malbonhumora, kaj krome komenciĝis pluvego. Tiam fajfo tranĉis la aeron, longa kaj akra fajfo. La maljuna hundo rigardis la du junajn, sed ili ne atentis; fajfis neniu el iliaj mastroj. Tiam la maljuna senmastra hundo streĉis la orelojn; ĝi subite sentis sin tre stranga. Jen ankoraŭ fajfo, kaj la maljuna hundo perplekse saltis jen unuflanken jen aliflanken. Fajfas ĝia mastro, tiam ĝi ja devas obei! Triafoje iu fajfis, same persiste kaj akre. Kie li do estas, kiudirekte? Kiel tio okazis, ke mi disiĝis de mia mastro? Kaj de kiam ni disiĝis, de hieraŭ aŭ de tri tagoj aŭ eble de momento? Kaj kiel aspektis mia



mastro, kaj kian odoron li havis, kaj kie li estas, kie li estas? Ĝi kuris en rondoj priflarante ĉiujn preterpasantojn, sed neniu estis ĝia mastro, kaj neniu volis esti tia. Tiam ĝi turnis sin kaj kuris malsupren laŭ la strato; ĉe domangulo ĝi haltis por rigardi ĉirkaŭen ĉiudirekte. Ĝia mastro ne estis tie. Tiam ĝi galope rekuris laŭ la strato; koto ŝprucis de ĝi kaj pluvakvo fluis de ĝia felo. Ĉiungule ĝi haltis, sed nenie troviĝis ĝia mastro. Tiam ĝi sidiĝis en stratkruciĝo, streĉis sian hirtan kapon al la ĉielo kaj hurlis.

senmastran, kiu streĉas sian kolon al la ĉielo kaj hurlas, hurlas? La aliaj hundoj malrapide fortrotas kun la vosto inter la kruroj; ja ili ne povas konsoli nek helpi.

**Hjalmar Söderberg, trad. Sten Johansson  
(1894)**

Fonto: **CRI online Esperanto**

Vi ankaŭ povas aŭskulti la rakonton en la jena paĝo:

<http://esperanto.cri.cn/2781/2017/04/24/175s192788.htm>

Ĉu vi iam vidis, ĉu vi iam aŭdis tian hundon forgesitan,

## Poemoj de Roland Platteau

Sur  
neĝa pad' via fot'-spur'  
ĝemigas,  
vin ne tuŝi sur.

**Roland Platteau**



*Poemo laŭ la ĉina  
formo de deksex-  
silabo (1, 7, 3, 5);  
rimoj : aaba*



## Neforgesebla kastelo

Liberkaĝe,  
liberkaĝe,  
super muĝas nuboj sovaĝe;  
herbej' ĉiam vaste,  
Interfenestre  
loĝi,  
loĝi,  
hejm- kaj am-e  
en la sia kastelo.

**Roland Platteau**

**Por informo:** Tiu eksterordinara kastelo troviĝas en Bretonio. Sur la foto ne videblas, sed ne nur la pordo sed la grandaj fenestroj de la kastelo ĉe la etaĝo estis malfermitaj ambaŭflanke (tiel oni povis vidi la ĉielon trans la loĝejo). Mi ne scias ĉu tio senteblas en la foto, sed kiam oni estis korpe antaŭ tia vido, kaj sub la ĉielo kaj vento en varmeta finsomero, kaj imagis la vivon en tia kastelo, kiu estus sia hejmo, kun la plenmalfermitaj fenestroj sub la nuboj tio efektis belan impreson neforgeseblan. Ĉar mi estis ĵus ĉeestinta Esperanto-staĝon pri ĉina poezio, mi inspirita de certaj ĉinaj poemoj legitaj verkis poemon en la formo de Tjaŭŝjaŭling pri tiu kastelo



Mori estis knabineto kun grandaj brunaj okuloj. Ŝi vivis kun siaj gepatroj en belega kokospalmejo apud eta blua lago. Ĉiun matenon ŝi portis

grandan malplenan korbon sur sia kapo dum ŝi piediris al la lago. Ŝia patrino sekvis kun la aĵoj kiuj bezonas esti lavataj kaj ŝia patro kunhavis grandan reton por fiŝkapti. Ŝia patrino lavis la vestaĵojn sur ŝtono apud la lago dum ŝia patro fiŝkaptis.

Li tiris la reton sur la teron kaj ili metis la fiŝojn en grandan korbon. Foje testudo estis kaptita en la reto, tiam Mori ĉiam rapidis por liberigi ĝin. Dum suna mateno kiam ŝi fiŝkaptis kun sia patro, Mori diris: "Se ni kaptas tiom da fiŝoj iam neniu plu restos!" Ŝia patrino ekridis kaj diris ke ŝi iru al la lernejo.



En la ombro de la palmoj la patrino de Mori dormetis maltrankvile. Ŝi sonĝis pri lago sen fiŝoj. Tiam vento blovante tra palmofolioj flustris: "Akvo kaj tero ĉiam

donis al vi kaj al via familio vivrimedojn, nun estas via vico zorgi pri ili." Ŝi vekigis kun larmoj en la okuloj, ĉar ŝi ne sciis kiel havi sufiĉe da mono por eduki Mori se

ŝi vendas malpli da fiŝoj. Dum la tuta posttagmezo ŝi sidis, plektis kokostapiŝetojn kaj pensis pri sia sonĝo.

Vespere Mori aŭdis siajn gepatrojn mallaŭte diskuti kaj la olelampo lumigis ĝis malfrue dum la nokto. La venontan matenon ŝia patro donis al ŝi malpli grandan korbon. "Kiel ni sukcesos porti ĉiujn fiŝojn en tiu eta korbo?" demandis Mori.



"Ni prenos nur tiom da fiŝoj kiom eblas meti en tiun korbon," li respondis. Mori miris. Reveninte el la lernejo ŝi ĝojis vidante sian patrinon prepari sapon kaj oleon el kokosnuksoj. Mori lerte grimpis sur arbon por preni pliajn kokosnuksojn, sed ŝia patrino avertis ŝin, "Ne faru, ni devas uzi nur tiujn kiujn la arbo donas al ni." Ŝia patro aldonis: "Ni uzis nur la kokosnuksojn kiuj falis sur la teron por krei tiujn aĵojn. Rigardu, ni eĉ metis jasmenfloron en tiun sapon!"

Ekde tiu tago la familio kreis balailojn el folioj de la palmarboj kaj plektis tapiŝetojn el fibroj de kokosoj. Ili vendis sapon, oleon kaj nur malgrandan kvanton da fiŝoj en la bazaro. Kiam Mori estis pli aĝa, ŝi tre ŝatis ĉizi etajn testudojn el kokosŝeloj kaj ŝi ĉiam havis kelkajn ĉirkaŭ la kolo.

de Deepa Gangwani kaj Tina Suchanek

Fonto: BookBox <http://www.bookbox.com/>

## Pri kio ridis Zamenhof?

# LA ESPERANTISTO.

Gazeto de la lingvo internacia „Esperanto“.

Zeitschrift für die internationale Sprache „Esperanto“. | Gazette de la langue internationale „Esperanto“.

Eldonata unu fojon en la monato de L. Zamenhof kaj W. H. Trompeter sub la redakto de L. Zamenhof.

Kosto por jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 frankoj (= 1 marko 60 pfenigoj = 80 kopekoj). Kiu alsendas la pagon por 10 ekzempleroj, ricevas 1 ekzempleron senpage. Anoncoj po 20 centimoj por duonpaĝa linio.

Redaktante la unuan Esperantan gazeton "La Esperantisto", Ludoviko Zamenhof prizorgis ankaŭ la rubrikon Bagateloj. Evidente li aperigis en ĝi tiujn ŝercojn kaj anekdotojn, kiujn li mem ŝatis. Legu do, pri kio ridis la tridekelk-jara Doktoro Esperanto en la foraj jaroj 1890-aj.

## Bagateloj

**Principo.** Luigantino de ĉambro: – Antaŭ ol Vi enloĝiĝas en mia ĉambro, mi devas al Vi rimarki, ke mi amas, ke oni akurate pagu la luan pagon. – Studento: Tio ĉi estas ankaŭ mia principo; aŭ akurate aŭ tute ne!

**Tro granda postulo.** – For! Al sanaj kaj fortaj mi almozon ne donas. – Kiel Vi volas; pro Viaj kelkaj centimoj mi al mi piedon ne rompos.

**Teruraj infanoj.** Onklino parolas kun malgranda nevo, kiu ĵus venis el la lernejo: – Nu, ĉu vi lernis aritmetikon? – Certe! – Kion do vi lernis? – Deprenadon. – Aha! Sekve se mi diros al vi, en kiu jaro mi naskiĝis, ĉu vi povos diri, kian aĝon mi havas? – Oho! Tiujn grandajn nombrojn i en la lernejo ankoraŭ ne lernis!

**Memfarita homo.** “Jes miaj sinjoroj”, predikas sinjoro A., trinkante sian glason en gaja kolegaro, “mia devizo ĉiam estis: “La homo mem devas ĉion al si ellabori”. Kiu meme al si helpas, al tiu ankaŭ Dio helpas! La 50 000 frankojn, kiujn mi posedas, neniu al mi donacis kaj ankaŭ de neniu mi ilin heredis, – ne, mi mem ilin gajnis en la loterio!”

**Bonigo.** Fianĉino: Diru, ĉu estas vera tio, kion mia patrino al mi diris? – Fianĉo: Kion do? – Fianĉino: Ke vi edziĝas je mi, ĉar mi poste havos grandan sumon da mono. – Fianĉo: Sed, mia infano, kontraŭe! Estus al mi eĉ pli agrable, se vi ĝin havus jam nun.

**Kiu scias?** – Kian doton do havas Via juna edzino? – Mi ne scias; kiam mi antaŭ la edziĝo demandis pri tio ĉi mian bopatron, li fariĝis malĝentila. – Kaj post la edziĝo? – Hm, tiam li fariĝis ankoraŭ pli malĝentila.

**Kuraĝulo.** “Sinjoro!”, krias unu maljuna fraŭlino el la vagono al unu sinjoro, kiu volas tien eniri: “tie ĉi estas la vagono por sinjorinoj!”. – “Ho!” respondas la sinjoro, enirante kaj dismetante siajn pakaĵojn, “mi ne estas timemulo!”

**Apetito.** Kial vi petas almozojn? – Ĉar mi volas manĝi, mia bona sinjoro. – Kial do vi ne laboras? – Ha, kiam mi laboras, mi ankoraŭ pli volas manĝi.

**Niatempa amo.** Mi Vin amas... – Sed mi estas malriĉa. – Pardonu, Vi ne lasis min elparoli ĝis la fino... mi amas Vin ne tiel, por edziĝi je Vi... – Ha, ha, ha! Mi volis nur elprovi Vin, mi havas grandegan kapitalon! – Pardonu, Vi tamen ne lasis min fini; mi amas Vin ne tiel, por edziĝi je Vi pro Via mono.

**Zorgo.** Vi estas tiel malgaja, al vi kredeble faras zorgojn viaj kreditoroj? – Jes, miaj kreditoroj estontaj, ĉar mi ĉiam zorgas, de kiu mi nun povos ankoraŭ prunti.

**Diferenco.** Kia diferenco estas inter la unua amo kaj la lasta? – Pri la unua amo oni ĉiam pensas, ke ĝi estas la lasta, kaj pri la lasta oni ĉiam estas konvinkita, ke ĝi estas nur la unua.

**El la historio.** A: Kial Hanibalo iris trans la Alpoj? – B: Ĉar tiam la tunelo ne estis ankoraŭ preta.

**En la juĝejo.** Juĝanto: Kiel oni vidas el la preparaj aktoj, la ŝtelado estas via profesio! Juĝato: Kion do vi volas, sinjoro juĝanto, ke mi ŝteladu por plezuro?

**Telegrama stilo.** Juna edzino naskis filinon. La edzo volis sciigi la patron de sia edzino pri tiu ĉi fakto, aldonante, ke la fakto havis lokon en la sepa horo matene kaj ke poste per letero li skribos pli detale. Li telegramis: “Hodiaŭ matene sepa filino naskita. Poste pli”.

**La pafanto.** Leŭtenanto: “Ni supozu, ke la malamiko staras tie ĉi antaŭ la arbo. Laŭ la komando “tri” vi ekpafos sur la arbon. Sekve atentu: unu – du – tri!.. Ha, mallerta urso, vi pafis ja preter la arbon!” – Rekruto: “Nu, kion do ĝi malutilas, sinjoro leŭtenanto? Kiam la malamiko efektive venos, tiam ja certe ne ĉiuj staros antaŭ la arbo, kelkaj staros ankaŭ apud la arbo!”

plukis **Halina Gorecka**

Fonto: La Balta Ondo

<http://sezonoj.ru/2017/04/zamenhof-19>

## Du ranoj



Grupo da ranoj pasis tra la arbaro kaj du el ili ekfalas en iun profundan foson. La aliaj ranoj, vidinte la profundecon de la foso, diris al la falintaj ranoj: "bedaŭrinde baldaŭ vi ambaŭ mortos".

Tiuj du ranoj ignoris iliajn diron kaj per siaj plenaj fortoj klopodis elsalti el la foso. Sed la aliaj ranoj daŭre ripetis: "Viaj penadoj estos senefikaj, ĉar tute maleblas eliĝi el tiu foso. Malbonŝance baldaŭ vi ambaŭ mortos".

Finfine, unu el tiuj du ranoj cedis pro la paroloj de la aliaj ranoj, kaj ne plu klopodis savi sin, kaj li tuj falis sur la fundon de la foso kaj mortis. Sed la alia rano per sia tuta forto ankoraŭ klopodis eliri el la foso... La aliaj ranoj kriis: "Via klopodo estos senefika". Sed ĝi nelacigeble daŭrigis sian klopodon, kaj finfine sukcesis eliri e la foso.

Kiam ĝi eliris el la foso, la aliaj ranoj diris: "ĉu vi ne aŭdis kio n diris a vi?" La rano en gesta lingvo sciigis ilin, ke ĝi estis surda.

Fakte tiu rano dum la tuta tempo pensis, ke ĉiuj estis kuraĝigantaj ĝin.

Tiun ĉi oran frazon ĉiam memoru: Neniam aŭskultu tion, kion oni diras, ke viaj deziroj kaj revoj neniam realiĝos.



**Amir Fekri**

## KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS (5)

### 5. Lingvaj rajtoj

UWE JOACHIM MORITZ

Vicprezidanto de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj

**La malegala disdivido de potenco inter la lingvoj estas recepto por konstanta lingva malsekureco, aŭ rekta lingva subpremado, ĉe granda parto de la monda loĝantaro. En la Esperanto-komunumo, la anoj de lingvoj grandaj kaj malgrandaj, oficialaj kaj neoficialaj, kunvenas sur neŭtrala tereno, dank' al la reciproka volo kompromisi. Tia ekvilibro inter lingvaj rajtoj kaj respondecoj liveras precedencon por evoluigi kaj pritaksi aliajn solvojn al la lingva malegaleco kaj lingvaj konfliktoj. Ni asertas ke la vastaj potenco-diferencoj inter la lingvoj subfosas la garantiojn, esprimatajn en tiom da internaciaj dokumentoj, de egaleca traktado sendistinge pri la lingvo. Ni estas movado por lingvaj rajtoj.**

Evidente, ĉi tie temas pri rajtoj ne de lingvoj, sed pri la rajto de homoj plene uzi sia(j)n lingvo(j)n en ĉiuj vivsektoroj kaj sur ĉiuj niveloj. Cetere, ni konsciu ke rajto tute ne devigas. Se, pro kiu ajn motivo, vi preferas paroli aŭ skribi nek en via denaska lingvo nek en Esperanto, sed en iu kiun vi adekvate regas el la 5.000 etnaj lingvoj de la mondo, vi plene rajtas utiligi ĝin.

### *plej gravas la rajto uzi sian denaskan lingvon*

Plej gravas, ĉiukaze, la rajto uzi sian denaskan

lingvon, kiun oni regas pli bone ol iun alian. Ni prenu konkretajn situaciojn:

- \* Kiam geetuloj eniras infanvartejon aŭ la unuan klason de elementa lernejo, ĉu ili "naĝos" en sia familia lingva medio aŭ ĉu oni puŝos ilin en nekonatan lingvan maron?
- \* En kiu lingvo okazos, 10 aŭ 15 jarojn poste, profesilernado aŭ universitataj studoj?
- \* Ĉu necesas unue lernegi la ŝtatan lingvon aŭ eĉ la anglan por povi legi la bezonatajn fakajn librojn?
- \* Ĉu la sekretario de via urbestro, la juĝisto kaj aliaj aŭtoritatoj scipovas vian lingvon, aŭ ĉu vi, simple, adaptas vin al ili, laŭ la



“... [ili] ne postulu pli da lingvaj rajtoj, ĉar ilia lingvo simple ne [...] disponas pri la leksikaj rimedoj [...] pri nuklea hemio...”

\* **digloseco**: *situacio, en kiu du aŭ pli da lingvoj aŭ dialektoj estas uzataj en malsamaj funkcioj aŭ por malsamaj (prestiĝaj aŭ neprestiĝaj) celoj.*

"demokrata" principo ke ni obeu la plimulton?

\* Ktp.

Por la plej multaj esperantistoj, la ĉi-supraj demandoj ne saĝas problemaj, ĉu pro tio ke ilia denaska lingvo estas la ŝtata (aŭ unu el la diversaj ŝtataj lingvoj), ĉu pro tio ke ili estas tiel "bone" edukitaj ke ili ne plu konscias pri la jam kutima digloseco\*.

Ni demandu alianivele:

\* Ĉu vi mem aŭ viaj samlandaj specialistoj pri - ni diru ekzemple - muzik-historio aŭ zoologio parolas vian/sian denaskan lingvon en internacia kongreso?

\* Kiun lingvon uzas via ministro pri eksterlandaj aferoj en diskutoj kun siaj gekolegoj en Unuiĝintaj Nacioj?

\* Ĉu via komerca entrepreno havas ŝancojn en la tutmonda merkato, se vi utiligas vian denaskan lingvon kaj se tiu ĉi ne estas la kastilia, franca aŭ angla?

\* Ktp.

Nun, probable, ĉiuj esperantistoj unuanime protestos kontraŭ la nejusta lingvouzo sur internacia scenejo kaj ripetos sian tiel ofte prezentitan postulon pri enkonduko de la internacia lingvo. Prave.

Tamen, ĉu vi jam demandis vin, ĉu ni estas kredindaj kaj fidindaj, kiam ni vojaĝas sub la flago de "movado por lingvaj rajtoj"?

La ĝenerala Esperanto-movado ankoraŭ ne konscias pri la dua dimensio de la tutmonda lingvo-problemo. Se la uzantoj de la internacia lingvo pledas por la rajto libere utiligi sian propran lingvon, ili nepre ne fermu la okulojn antaŭ la diskriminaciado praktikata interne de la plej multaj ŝtatoj.

Mi asertas ke la lingvaj problemoj, kun ĉiuj konsekvencoj derivitaj el ili, estas multe pli gravaj por, ekzemple, bretono, sorabo, sameo aŭ friso, ol por nederlandano, suomo, germano aŭ franco. La anoj de lingvaj minoritatoj duoble suferas la ĝenojn kaj ŝarĝojn de siaj samlandaj lingvomajoritatoj. Pro praktikaj kaj juraj kaŭzoj, la minoritatoj normale lernas kaj sekve scipovas (la) oficialan lingvon de sia ŝtato. Krome, ili pli-malpli posedas sian denaskan - ofte gepatran - propraetnan lingvon. Depende de la historia situacio kaj de aliaj faktoroj, en multegaj kazoj tiu ĉi lingvo ne estas ĝisdate evoluinta kaj do ne preta por ĉiukampa aplikado. Konsekvence tiaj minoritatoj vole-nevole ne estas veraj dulingvuloj, sed diglosuloj: ili uzas sian propraetnan lingvon en iuj rilatoj (kutime en la familio, inter geamikoj, en la propra kvartalo/vilaĝo, eventuale en sia profesio kaj iom en kultura aktivado), kaj la alia lingvo servas por oficialaj celoj (lernejo, administracio, "granda politiko") kaj rilatoj kun eksteruloj.

Iu naivulo diros ke, do, tiuj diglosuloj ne postulu pli da lingvaj rajtoj, ĉar ilia lingvo simple ne estas ĝisdata, ne disponas pri la leksikaj rimedoj por lekciado pri nuklea ĵemio kaj tiaj komplikajtoj. Plene maltrafe. Ĉu la franca aŭ la itala aŭ la angla aŭ la ... lingvo nun disponus tiujn terminojn, se ankoraŭ la lingvo de la kleruloj estus la latina? Ĉar ekzistis nek polico kaj armeo nek "logikaj" leĝoj por protekti la monopolon de la latina lingvo, la koncernaj etnoj, kun sufiĉe progresintaj ŝtataj strukturoj, povis lingve emancipiĝi dum jarcentoj. Samspire, ili plialtigis la obstaklojn por akiro de tiaj rajtoj fare de la lingvaj minoritatoj.

Kion ni substance postulas, kiam ni pledas por lingvaj rajtoj?

Ne sufiĉas la jura samrajtigo de ĉiuj lingvo-

komunumoj, kvankam tio estas la nepra antaŭkondiĉo. Multegaj el ili - ankaŭ inter la ŝtatnivelaj kiel, ekzemple, la luksemburga kaj la irlandgaela - bezonas moralan apogon por ke ili ne rezignu rezignacie pri la rajto ĉie - ankaŭ en la eŭropaj institucioj - uzi sian respektivan lingvon. Krome, ili bezonas ekonomian subtenon por profunde modernigi siajn lingvojn, interalie, per pretigo de ĝeneralaj kaj fakaj vortaroj kaj lernolibroj pri kaj - elstare grave - en la koncernataj lingvoj.

Nur kiam ĉiuj lingvokomunumoj estos jure kaj fakte emancipiĝintaj, memstaraj, "plenkreskaj" - nur tiam ili estos maturaj por eventuale cedi iujn rajtojn al pli altnivelaj organizaĵoj (Eŭropa Unio, Unuiĝintaj Nacioj k.s.). Tiam povos regi lingva - kaj sekve, espereble, ankaŭ kultura - demokratio, kondiĉe ke la lingva tegmento por ĉiuj, la ponto inter ĉiuj komunumoj, estos internacia, neŭtrala esprimilo. Evidente, ankaŭ tiu ĉi komunikilo devos esti matura, preta por ĉiuj interhomaj bezonoj, ĉar sen tia prepariteco la plej grandiozaj rajtoj valoras nenion.

(daŭrigota)

*Jen popolo,  
ligu ĝin per ĉenoj,  
kaj senvestigu ĝin,  
ĝstopu ĝian buŝon,  
ĝi tamen liberos.  
Prenu for laboron  
kaj ĝian pasporton  
kaj la manĝotablon  
kaj la dormoliton,  
ĝi tamen plu riĉos.  
Ĉar popolo  
iĝas malriĉa kaj sklava,  
se oni prenas la lingvon  
donitan de la gepatroj:  
ĝi por eterne estos perdita.*

Ignazio Buttitta,  
sicilia poeto (n. 1899).  
Trad. Renato Corsetti




*"Esperanto-literaturo inkluzivas multajn originalajn verkojn kaj tradukojn de klasikaj kaj popularaj aŭtoroj... [Ĝia] elstara trajto, facile klarigebla, estas la graveco de verkistoj el malgrandaj lingvoj..."*

NITOBE Inazoe en 1921;  
Fettes & Bolduc 1998, p.71

Libroservo en la Praga UK





7

“Sed mi estas alilandano kaj ne havas laborpermeson,” kriis Rikardo, forte tenanta sin je la lasta motivo, kiu pravigus lian rifuzon labori.

“Tio ne estas problemo,” trankvile respondis la ĉiam praktika Katarina, kaj ŝi

malfermis sian sakon.

“Jen,” ŝi diris, eltirante ofic-aspektajn paperojn. “Ni bezonas nur vian foton. La ceteron mi mem aranĝos. Certe troviĝas skribmaŝino ĉi tie, ĉu ne?”

“Sed... Kiel eblas?” Rikardo miris.

“Nu, ankaŭ mi estas eksterlandano. Jam pasintjare mi venis ĉi tien somere, kaj mi demandis en la koncerna oficejo, ĉu eblas portempe labori. Mi ricevis trimonatan laborpermeson. Dum mi estis tie, la funkciulon oni vokis aliloken. Mi utiligis lian du-minutan foreston por al-mi-igi kelkajn el tiuj dokumentoj. Ili ĉiam povas utili, ĉu ne? Kiu scias, kiam similaĵoj povas helpi? Kapti tiajn okazojn, kiam la sorto ilin prezentas, jen mia principo. Fakte, mi pravis. Ĉi-jare, la ŝtato decidis ne plu havigi portempan laborpermeson al eksterlandaj studentoj, pro la enlanda senlaboreco.”

“Sed la stampo kaj la...”

“Lasu min fari. Mi konas la necesajn metodojn. Stampon mi facile transigos de unu dokumento al alia per rimedo mia, ege simpla, kiu mirigos vin, kiam vi vidos min fari. Estos facile; ĉio, kion mi bezonas jam troviĝas en ĉi tiu kuirejo. Mi tion konstatis traserĉante por pretigi la kafon. Kaj la subskribojn mi refaros perfekte. Mi estas fakulino pri malveraj dokumentoj. Ĉu vi havas foton?”

“Ne.”

“Do, iru tuj.”

“Sed se vi diras, ke oni decidis ne havigi laborpermeson al eksterlandaj junuloj, via dokumento, eĉ se perfekta, valoros nenion!”

“Vi ne bone atentis min! Mi parolis nur pri studentoj. Vi ne estos studento. Vi estos juna eksterlandano, kiu vivas ĉi-lande jam de jaroj kun siaj gepatroj, kaj volas ŝanĝi la laboron, ĉar li ekde la infanaĝo deziras fariĝi gardisto. La fakto, ke vi perfekte parolas la lingvon, helpos ilin kredi ĉion ĉi. Rapide sciigu al mi viajn naskiĝ-daton kaj lokon, kaj... nu, ni vidu, kiujn informojn ili volas. Post tio, vi tuj iru fotigi vin.”

(daŭrigota)

## Tre grava novaĵo por eŭropaj esperantistoj



Malgraŭ grandaj labordevoj, la eŭropa komisionano Vytenis Andriukaitis akceptis la inviton de la estraro de EEU veni al nia konferenco organizata kune kun GEA dum la kongreso en Freiburg kaj prelegi pri Zamenhof. Tio estas granda ofero por la E-movado kaj montras lian pretecon subteni nian movadon malferme kaj praktike. Neniam ĝis nun iu tiel alte poziciata funkciulo de EU vizitis iun nacian E-kongreson kaj Eŭropan E-konferencon. Post lia pasintjara partopreno en la

konferenco de Nitra kaj UK, li venas al ni la duan fojon. Dum lia partopreno la estraro de EEU havos kunvenon kun li kaj diskutos pri komunaj projektoj, kiujn EEU planas entrepreni kaj sen lia helpo estas nerealigeblaj. Ni kredas ke ni trovos konkretajn punktojn inter niaj tri pripensitaj proponoj por atingi celojn kiuj iamaniere enplektas la Eŭropan Komisionon en agadon, kiu signifus ke ĝi traktas E-on serioza socia projekto inda esti traktata.

Ni invitas esperantistojn kiuj ŝatus eluzi tiun ĉi okazon kaj konstrue partopreni en serĉado de solvoj kaj subteno al Andriukaitis en liaj klopodoj, veni al la konferenco en Freiburg.

Zlatko Tišljarić

Fonto: Eŭropa Bulteno Marto/aprilo 2017, Numero 169  
<http://www.europan.eu/eo/euhropa-bulteno>

## Mallonga Historio de Filozofio (17)



**Saluton,**  
**En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la filozofoj Voltaire kaj Leibniz**

**Vasil Kadifeli**

### La plej bona el la eblaj mondoj Voltaire kaj Leibniz

Se vi estus tiu, kiu desegnis ĉi tiun mondon, ĉu vi desegnus ĝuste tiel, kiel ĝi estas nun? Plej eble ne! Sed en la 18-a jc homoj pensis ke nia mondo estis la plej bona. Ĉio en la mondo havis sian kaŭzon. Ĉio estis kreita de la ĉiopova Dio kaj pro tio nia mondo estis la plej bona. La ekzisto de malsanoj, inundoj, fajroj, tertremoj, sekeco ktp estis parto de la plano de Dio. Ni eraras ĉar ni vidas la detalojn kaj ne la tutan bildon. Sed el la vidpunkto de Dio ĉio estas perfekta.



La germana filozofo Leibniz (Gottfried Wilhelm von Leibniz) pensis same kaj diris ke ĉio havis logikan eksplikon. Li pensis ke Dio nenion lasas por ŝanĉo. Li eble ne kreis perfektan mondon ĉar tiam tiu mondo estus kvazaŭ Dio. Ĉi tiu

mondo estis la plej bona sed kun nur iom da malbonaĵoj.



Voltaire (François-Marie Arouet) aliflanke, alproksimiĝis al tiu poemo el alia vidpunkto. Li ne ŝatis la pensojn, kiuj diris, ke ĉio estis kaj iris bone. Li dubis pri filozofoj kiuj ŝajne posedis ĉiajn respondojn al problemoj. Li estis verkisto, poetisto,

dramisto, novelisto, kaj pensulo kaj ĉiuj konis lin pro liaj bravaj pensoj. Oni diras ke li iam diris “mi naŭziĝas pro viaj diroj sed mi ĝismorte defendos vian rajton esprimi ilin”. En la 18-a jc la katolika eklezio estis kontrolanta ĉiujn verkaĵojn tre strikte. Pro tio multaj de liaj verkaĵoj estis malpermesitaj kaj bruligitaj. Iam li riproĉis aristokraton kaj pro tio li estis malliberigita en Bastilo. Sed nenio malhelpis lin defii antaŭjuĝojn kaj hipokritecon.

En sia fama novelo Candide (1759) li provis detru la optimismajn pensojn de papo kaj Leibniz pri la homaro kaj universo kaj li tion faris per amuza mieno. Lia libro tuj elĉerpiĝis. Sed li ne metis sian nomon sur la libro alie ĝi estus cenzurita kaj li eble estus denove malliberigita. En ĉi tiu verko li incitas la optimismon de Leibniz, kiun li prezentas per la fikcia karaktero de filozofo Pangloss. Voltaire kredis ke estis tro da malbonaĵoj en ĉi tiu mondo, do Leibniz ne povus esti prava. En la jaro 1755 okazis la tertremo en Lizbono, kiu mortigis 20,000 homojn, kaj poste okazis tsunami kaj fajroj en la tuta urbo do la tuta urbo estis detruita. Pro tio la kredo de Voltaire je Dio estis skuita. Kial tiom da mortintoj kaj doloroj? Kaj kial ĝi okazis en Lizbono kaj ne en iu alia loko? En la plej trafa parto de sia libro li uzis tiun temon kun multaj aliaj malbonaĵoj, sed Pangloss ĉiam provis trovi la bonan intencon de Dio en ĉio kio okazis. La alia kaj ĉefa karaktero Candide, kiu estas naivulo kaj boninteca junulo, en la komenco kunhavas la ideojn de Pangloss sed poste fariĝas dubema pri filozofio kaj provas trovi aliajn pli praktikajn solvojn al la problemoj. Post multaj travivaĵoj, en la fino Candide, sia amatino, Pangloss kaj iu alia loĝas en la sama domo, kaj ili decidas labori kaj fari tion, kion ili plej bone konas. Pangloss provas esprimi ĉion, kio okazis, kiel la kialon al la bona fino de iliaj travivaĵoj, sed Candide diras “Bone, sed ni devas priplanti nian ĝardenon”. Kaj tiu estas la plej trafa parto kaj ĉefa temo de la novelo. Oni devas priplanti sian ĝardenon kaj fari ian utilan laboron. Tio estas, kion homoj devas fari por feliĉiĝi. Ni ĉiuj devas priplanti nian ĝardenon.

Voltaire nekutime al la aliaj filozofoj estis riĉa homo. Tio helpis lin esti ekonomie libera por defendi siajn kazojn kaj pensojn. Li ĉiam ŝatis batali kontraŭ maljusteco. Ekzemple li ĝisfunde defendis Jean Calas, kiu estis akuzita mortigi sian filon, kiu fakte memmortigis sin. La juĝejo ne akceptis la pruvojn kaj kvankam la klopodoj de Voltaire, Jean Calas estis ekzekutita. Tio estis kion li intencis diri “ni devas priplanti nian ĝardenon”.

Oni povas pensi ke Voltaire estis ateisto. Li fakte estis deisto. Li pensis, ke pruvojn de la ekzisto de Dio oni povus trovi en la naturo. Laŭ Voltaire nur rigardi la cielon dum la nokto kaj vidi la brilantajn ŝtelojn signifas ke Dio ja ekzistis.

**(daŭrigota)**

## EL UNUA PARTO - TAŬO

21

La enhavo de l' granda VIVO sekvas tute la TAŬO-n.

La TAŬO estigas la aĵojn, tiel kaose, tiel malhele.

Kaosaj, malhelaj estas en ĝi la bildoj.

Malhelaj, kaosaj estas en ĝi la aĵoj.

Neesplorable profunda estas en ĝi la semo.

Tiu semo estas tute vera.

En ĝi estas fidindeco.

Ekde praaj tempoj ĝis hodiaŭ la nomoj ne estas malhaveblaj por superrigardi ĉiujn aĵojn.

El kio mi scias la manieron de ĉiuj aĵoj?

Ĝuste el ili mem.

### Rimarko de Anniespera

En la originala teksto estis uzata la vorto "Jing" (fonetike), kiu signifas ofte "Jing Hua" (fonetike), t.e. esenco, sed ne "Jing Zi" (fonetike), t.e. "Semo". Vd. pri tiu tekstparto ankaŭ Wang Chongfang: "Tamen en ĝi estas tenata la subtila esenco. La esenco estas tre konkreta, kaj en ĝi estas latentia io vera."

22

Tio, kio estas duona, fariĝos tuta.

Tio, kio estas kurba, fariĝos rekta.

Tio, kio estas malplena, fariĝos plena.

Tio, kio estas malnova, fariĝos nova.

Tiu, kiu havas malmulton, ricevos ion.

Tiu, kiu havas multon, konfuziĝos.

Tiel estas ankaŭ pri la saĝulo:

Liaj konsideroj ampleksas la tuton kaj estas imitinda ekzemplo.

Li ne volas mem brili, tial li estas lumigata.

Li ne volas mem esti elstara, tial li fariĝas elstara.

Li ne gloras sin mem, tial li plenumas verkojn.

Li atentigas ne mem pri si, tiel li estas range levata.

Kun tiu, kiu ne kverelas,



ja neniu en la mondo povas kvereli.

Tio, kion diras la maljunaj,

ke el duona fariĝu plena,

efektive estas ne nur vortoj.

Tio inkludas ĉiun veran perfektecon.

### Rimarkoj de Cezar

Vilhelmo mencias, ke la unua verslinio estas kvazaŭ metaforo pri Luno, la dua pri raŭpo aŭ ŝnuro, la tria pri kavetaĵo en la tero, kiu plenigas sin per akvo, kaj la kvara pri la folioj de arbo. Mi konfesas, ke tiu klarigo ne estas tre konvinka por mi.

Anniespera atentigis nin, ke la ĉina vorto "zheng" (fonetike) signifas "jing zheng" (fonetike), t.e. "konkuri", sed ne "zheng chao" (fonetike), t.e. "kvereli." La traduko de Wang Chongfang estas sendube multe pli bona. Tial mi citas lian ĉapitron 22:

*Estu cedema, kaj vi konservos vin tuta;*

*Estu fleksebla, kaj vi estos rekta;*

*Estu malplena, kaj vi fariĝos plena;*

*Estu kaduka, kaj vi renoviĝos;*

*Prenu malmulton, kaj vi ricevos;*

*Havu multon, kaj vi konfuziĝos.*

*Tial la Saĝulo tenas sin je la Praa Unuo, la TAŬO, kaj uzas ĝin kiel la kriterion por juĝi ĉion sub la Ĉielo.*

*Estante neelmontriĝema, Li havas saĝon brilan;*

*Ne konsiderante sin ĉiam prava, Li estas prudenta;*

*Ne farante fanfaronojn, Li estas merita;*

*Ne fierante pri si mem, Li estas eminenta.*

*Ĝuste, ĉar Li ne konkuras,*

*Neniu en la mondo povas konkuri kun Li.*

*Kiel do povus esti malplena frazo la antikva popoldiro:*

*Estu cedema, kaj vi konservos vin tuta.*

*Tenante sin je la Taŭo, oni ja povas konservi sin bone.*

(daŭrigota)

Esperanto Revuo nun havas novan retejon: <http://revuoesperanto.org/>



## Ŝercoj



- Kelnero - bonvolu doni al mi bifstekon.
- Kun plezuro.
- Ne, kun mustardo!

(sendis Barbara Gut)

-----

La lernantoj lernas pri la sezonoj.

La instruistino demandas knabon:

- Ĉu vi scias kiam oni kolektas fruktojn?
- Kiam en la ĝardeno ne estas hundo!

(sendis Barbara Gut)

Du vendistoj interparolas. La unua diras: "Hieraŭ mi vendis melkmaŝinon al kamparano Huber, kiu posedis nur unu solan bovinon." Respondas la dua: "Vi fripono! Sed Huber estas mizerulo, ĉu entute vi ricevos vian monon?" – "Ne zorgu: Mi prenis lian bovinon kiel pago..."

-----

Kliento al vendisto:

- Ĉu eblus provi vestaĵon ĉe la montrofenestro?
- Eblus..., sed bonvolu provi ĝin ĉe la provejo.

(esperantigis David Trembla)



## Kruĉvort-enigma




### Horizontale

1. Komisiono de UEA por la Mez-Orientaj kaj Nord-Afrikaj landoj. Malgranda regno ĉe la Persa Golfo kaj lando de MONA.
2. Tre forta emo al io. Tute simila, neniel diferencigebla de alia.

diferencigebla de alia.

3. (inverse) Land' kun ĉefurbo Daŭho kaj land' de MONA. Trafik-signo de MONA lando kies ĉefurbo estas Ankaru.
4. (inverse) MONA lando kies ĉefurbo estas Kartumo. MONA lando en Azio konsistanta precipe el la valoj de Tigriso kaj Eŭfrato.
5. La centra organo de la sangocirkuliga sistemo. Ĉinia kameli' kultivata por folioj uzataj por prepari varman trinkaĵon. Resendu (sonon)!
6. Favora okaz'. Partikulo, uzata por akcenti, emfazi la realecon de ideo entenata en frazo aŭ en vorto.
7. (inverse) Senvokala meblo, uzata por kuŝe ripozaj kaj dormi. MONA lando en Azio kies ĉefurbo estas Teherano.
8. Tel-Avivo estas la haven-urbo de tiu MONA lando.
9. La dekkvina grafemo de la Esperanta alfabeto. Verk', en kiu oni imitas la karakterizaĵojn de konata aŭtoro, uzante ilin en ridiga, burleska maniero.
10. MONA lando ĉe la bordo de Mediteraneo kies ĉefurbon iam oni konsideris kiel "Parizon de oriento". MONA lando kies ĉefurbo estas Damasko.



### Vertikale

1. MONA lando en NordAfriko kiu havas marbordon ĉe Atlantiko.
2. MONA lando situanta en la orienta parto de la Arabia Duoninsulo. (inverse) Nomo de latina grafemo kaj simbolo de la unua nekonata kvanto, en algebro.
3. Tuto de la notoj, vortaj aŭ ciferaĵaj, donitaj al lernanto dum la jaro. Vest' unupeco, pli-malpli longa, kun aŭ sen manikoj, ofte striktigita per zono, uzata de virinoj.
4. Rilata al la alpreno, per oficiala laŭleĝa akto, iun kiel sian propran filon aŭ filinon.
5. Instrucio signifanta "komencu!", "iru!" ks. Likva

gras', triglicerid' de oleata acido.

6. Simbolo de la baza unuo de maso en la internacia sistemo de mezurunuoj. Senvokala poemo, en kiu la aŭtoro kritikis moke la ridindaĵojn aŭ malvirtojn de la samtempuloj.

7. Mallongigo de federacio de sep emirlandoj en la Araba duoninsulo kaj MONA lando. Ano de la ĉefa gento de regno en orienta Afriko kies eksa nomo estas Abisenio (sed ne MONA lando)

8. Senvokala malalta terparto, pli-malpli ĉirkaŭita de montoj, ĝenerale kavigita de rivero aŭ glacirivero.

Simbolo de kemia elemento, kun amfotera karaktero kaj atomnumero 44. Ludkart', ĵetkuba fac' aŭ domenpec' kun unu sola punkto.

9. La senvoĉa deka grafemo de la greka alfabeto.

Rilata al organo, ĝenerale para, troviĝanta en la abdomena kavaĵo de la vertebruloj, kaj servanta por elfiltri konsistaĵojn de urino el la sango. (inverse) Unu mov' en ia direkto.

10. River' en Hispanio kaj Portugalio, kiu enmariĝas en Lisbono. Element' kun simbolo "Au" kaj atomnumero 79.

11. MONA lando kiu etendiĝas ekde la Balkana duoninsulo ĝis la Proksima Oriento. Superhoma estaĵ', kultata de homoj pro siaj supernaturaj povoj super homaro kaj mondo. Prefikso kun la signifo «koncernanta la vivon aŭ la vivulojn».

(solvo en la lasta paĝo)

## el "Lingvaj Respondoj" de L.L.Zamenhof (5)

## Gramatiko

### Pri la sufikso «aĵ» apud verbaj radikoj

Vi diras, ke kiam verba radiko ricevas la sufikson «aĵ», tiam ni ofte ne scias, ĉu ĝi signifas «io, kio faras» aŭ «io, kio estas farata». Kelkaj Esperantistoj opinias, ke la sufikso povas havi nur unu el la diritaj du sencoj, ekzemple nur la aktivan, kaj ĉiufoje, kiam ili trovas la diritan sufikson kun la senco pasiva, ili rigardas tion ĉi kiel simplan eraron. Tiu ĉi opinio tamen estas ne ĝusta: «aĵ» per si mem havas nek sencon ekskluzive aktivan, nek sencon ekskluzive pasivan, kaj tial ĝi povas esti uzata en ambaŭ sencoj. Severe precizigi la signifon de tiu ĉi sufikso en la senco aŭ nur aktiva aŭ nur pasiva — laŭ mia opinio — estas ne konsilinde, ĉar tio ĉi tute senbezzone ligus nin kaj devigus nin ofte uzadi tro longajn formojn. Ĝenerale mi devas ripeti ĉi tie tion, kion mi jam kelkajn fojojn esprimis ĉe aliaj okazoj: ni ne devas peni, ke nia lingvo estu tro preciza, ĉar tiam ni nin mem nur katenus kaj ofte, por esprimi plej simplan ideon, ni devus uzi vorton deksilaban; ĉiufoje, kiam ni sen timo de malkompreniĝo povas doni al la uzanto liberecon, ni devas tion ĉi fari kaj permesi al li uzi laŭvole diversajn formojn (se ili nur ne estas kontraŭ la leĝoj de nia lingvo aŭ kontraŭ la logiko aŭ komprenebleco), anstataŭ postuli, ke li nepre uzu ĉiam nur unu formon. En ĉiuj okazoj (tre maloftaj), kiam la simpla uzado de «aĵ» povas doni ian malkompreniĝon, ni povas ja tre bone helpi al ni (kiel vi mem tute prave proponis) per la uzado de participo aktiva aŭ pasiva (ekzemple «ŝmirantaĵo» kaj «ŝmirataĵo», kiuj ambaŭ prezentas formojn tute regule kreitajn laŭ la leĝoj de nia lingvo); sed ĉar, el 100 verbaj vortoj kun «aĵ», 99 estas tute klaraj, kial do ni devas senbezzone kateni nin kaj, precizigante la signifon de «aĵ» nur aktive aŭ nur pasive, konstante esti devigataj uzadi «antaĵo» aŭ «ataĵo» en ĉiuj aliaj okazoj? Por kio uzi ekzemple la

longajn formojn «estantaĵo», «kreskantaĵo», aŭ «sendataĵo», «kraĉataĵo», k.t.p., se ni egale klare povas esprimi tion saman per la pli mallongaj «estaĵo», «kreskaĵo», «sendaĵo», «kraĉaĵo» k t p., pri kies senco povas ekzisti nenia dubo? Sekve se vi volas klarigi la signifon de «aĵ» kun verbaj radikoj, tiam anstataŭ diri, ke «aĵ» kun verbo signifas nur «io, kio faras», aŭ nur «io, kio estas farata», mi konsilas al vi diri: «aĵ» kun verbo signifas «ion, kio enhavas en si la ideon de la donita verbo»; ĉu tiu ĉi ideo estas aktiva aŭ pasiva — tion ĉi la sufikso «aĵ» tute ne devas montri al ni, ĉar tion ĉi montras la senco de la vorto mem aŭ — en okazo de speciala neceseco — la aldono de la sufikso de aktiveco aŭ pasiveco. Tiu ĉi «speciala neceseco» tamen aperas nur tre malofte, ĉar eĉ ĉe tiuj verboj, kiuj povas doni egale bone aĵon aktivan kaj pasivan, la senco de la aĵo estas facile komprenebla el la kunteksto; ekzemple se mi diros «mi donas tion ĉi al vi kiel garantiataĵon de mia reveno», neniuj povas dubi, ke ni parolas ne pri garantiataĵo, sed pri garantiantaĵo. Vian opinion, ke ofte (kiam povas ekzisti nenia dubo) ni povas eĉ forĵeti la «aĵ» kaj uzi simple nur la substantivan finiĝon «o», — mi trovas tute prava; sed en la plimulto da okazoj inter «o» kaj «aĵo» estas granda diferenco.

P. S. — Per stranga renkontiĝo de la cirkonstancoj mi ĵus ricevis leteron, kiu prezentas bonan ilustraĵon al tio, kion mi supre diris pri tro granda logikeco. Mia korespondanto skribas (iom ŝerce), ke la esprimo «Parolo de X en la kunveno Y» estas tute mallogika kaj malpreciza: anstataŭ «parolo» oni devas en tia okazo diri «antaŭpublikparolataĵo». Ĉu vi aprobas tian precizan vorton?

Respondo 11, La Revuo, 1907, Aprilo

## En la regno de l' senfinaj mil unu vortoj



Luma estas milda kaj feliĉa vortulino vivanta en la Regno de l' senfinaj mil unu vortoj. Ŝi estas ankaŭ muzika poezivorteto, leĝera kaj facilmovva kiel feinoj loĝantaj en proksima regno. Kiam Luma naskiĝis, la Patro komprenis, ke lia filino estas speciala, ĉar ŝi elmontris brilegan aŭreolon.



Luma kreskis en tiu regno farita el vortoj, versoj, poemoj kaj kanzonoj. Poetino ŝi estis kaj gracie servis ĉiujn donacante per sia dolĉa voĉo ĝojon al tristaj kaj forlasitaj vortoj. Ŝi ankaŭ laboradis kiel instruistino de muzikmalagordaj vortetoj, plibonigante ilin por estonteco.

Foje, Luma foriris frumatene por rikolti stelojn, plej zorge aranĝante ilin ene de la faldo de sia tuniko. Ŝi revenis hejmen nur kiam mateniĝis, kaj tiam ŝi metis la noktrikolton en grandan kristalan kruĉon nur por rigardadi la trembrilon de steloj. Kial ŝi agis tiamaniere?

Ha! Vizitante geamikojn, dumadiaŭe ŝi longe ĉirkaŭbrakis ilin kaj diskrete kaj ameme gluis sur ilian bruston trembrilan stelon, kiu sanigis la malsanulojn, vigligis la solulojn, lumigis tiujn, kiuj estis ene de mallumo; tiamaniere ŝi donacis sian kareson. Al malproksimaj amikoj ŝi kutimis sendi pensostelojn. Jen do la kialo de ŝiaj noktaj promenadoj por kapti stelojn...

Luma ankaŭ frekventis la templon de Verbum, saĝa sacerdoto, kiu lernigis ŝin malkovri sian specialan kapablon komuniki kun aliregnaj kaj alidimensiaj estuloj.

Tamen temis pri trudata kaj neobeebla regulo. Kiam Luma ricevis la plej altan gradon kiel Majstrino samtempe pri Muziko kaj Poezio, Verbum gravmiene ordonis al ŝi:

– Laŭtleĝu la ĵuron sur la sankta pergameno.

– “Mi neniam transpasos la limon de Poezio kaj Magio.”  
Kaj tiel okazis.

Tamen ekde tiu tago Luma falis en maltrankvilon ĉar, krom sendependa kaj kuraĝa, ŝi estas vortulino sufiĉe scivolema. Kio estas transponte? Ŝia menso dancadis laŭ la ritmo de l' kreskantaj demandoj. Petola vento flustradis ĉe oreloj de la floroj, disvastigante sekreton, kiu estas konata de ĉiu ajn krom Luma, kiu finfine ĝin malkovris multe poste.

Transponte estis la limo de la regno de homaj kreitoj! Kaj ekde nun Luma volis sperti homajn sentojn. Laŭ ŝia penso loĝus iu simila al ŝi en tiu mistera kaj nebula ombra regno. Sekve Luma-vorto obstine ekserĉis Luma-knabinon, sian referencan spegulon ene de tiu iom primitiva mondo!

Sur la alia flanko de la rivero de la vivo, Luma-knabino nomiĝas Maria el Lumo, aŭ simple Lumeto, laŭ sia volo.

Ankaŭ Lumeto estis estis milda poetino kaj kantistino; tamen, foje, ŝi fariĝis tre malĝoja kaj sola.

Aliflanke Luma konis kaj spertis nur ĝojon; ŝi neniam ploris antaŭ ol transpasi la sekreton de la malpermesata ponto....

Kiam Luma malfermis la okulojn, ŝi vidis sin ene de impona biblioteko en nekonata metropolo. Lumeto ĵus malfermis poezian libron, kaj subite vidis la ekleviĝantan Luman, kiu mane tuj salutis ŝin:

– Saluton! Mi estas Luma! Estas plezuro konatiĝi kun vi!

Tute surprizita, malgraŭ sia kutima kunvivado kun vortoj, Lumeto miris tiun neatenditan aperaĵon:

– Saluton, mi nomiĝas Maria el Lumo, Lumeto... Ĉu vi loĝas ene de tiu libro?

– Tute ne, knabino! Mi veturis per libro nur celante alproksimiĝi al vi.

– Ha! Bonege! Do ŝajnas, ke vi konas min, ĉu?!

Kiel mi ne konas? Mi scias ĉion pri vi! Mi deziras vian amikecon...

– Jes, kompreneble! Ĉu vi povus klarigi al mi kiel vi min konas? De kie vi venas? Kiu vi estas?

– Trankvile, Lumeto! Demandon post demando!

Tiamaniere, paciencplene, Luma klarigadis al la scivolema knabino. Unue ŝi raportis pri sia vivo en la Regno de l' senfinaj mil unu vortoj; pri la ĵuro farita al Verbum kaj finfine pri la malobeo al tiu grava

Aliflanke, ankaŭ Lumeto rakontis al Luma sian ĝisnunan iom tedan kaj malĝojan vivon. Ŝi preparolis siajn beletrajn kaj muzikajn preferojn, revojn kaj aspirojn. Tiamaniere ambaŭ ekkonsciis sian similecon: Luma kaj Lumeto, preskaŭ tute samaj. Ververe ili estis la du flankoj de la sama poezia monero.

Ekde tiam Lumeto kaj Luma ofte renkontiĝis en la granda biblioteko; ili interparolis pri ĉio, interŝanĝis

poeziaĵojn kaj ekkonadis sin reciproke.

Lumeto brilegis pro la ĝojo de Luma; aliflanke Luma kreskis en saĝeco spertante la la malĝojon de Lumeto: nostalgion, kiu foje venis milde kiam vesperiĝis.

Kaj la tempo pasadis. Fakte Luma ekloĝis en la biblioteko, kaj ekmalkovris la ombran flankon de tiu mondo. Vespere ŝi ekvidis centojn da fivortoj, kiuj foriris por sperti la noktan vivon de la fascina kaj danĝera urbego. Ŝi sentis sin sola kaj malĝoja. Lumeto ne povis akompani ŝin la tutan tempon, ĉar ŝi estas homa, ŝi devis studi, kanti en ĥoro, fari la hejmajn taskojn; cetere ĉio estis severe gardata de la patrino.

Estis nokte kiam Luma ploris pro hejmsopiro. Tiu forta unuafoje spertita malĝojo ĉirkaŭvolvis ŝin per peza kaj sufoka nuboj. Luma ekperdis la entuziasmon pri poezio, kaj samtempe ĉesis revii. Kaj ŝi ekfariĝis pli kaj pli senbrila kaj senkolora: ŝi malsaniĝis pro malĝojo, ostaĝoj de galopa soleco.

Aliflanke, en la Regno de l' senfinaj mil unu vortoj Patro kaj Verbum estis maltrankvilaj pro la malapero de Luma kaj, celante havigi helpon, ili decidis vojaĝi al alia proksima regno, kie ĉiuj vortoj estas feliĉaj.

En tiu regno la ĉielo estas smeraldverda, kaj verdaj steloj kantadas himnon omaĝe al universala frateco. Patro kaj Verbum estis karese akceptitaj de Esperanto, la spirita mentoro de tiu paca regno. Ili delonge scipovis paroli la lingvon uzatan de tiu popolo, pro tio estis facile konatiĝi kun tiuj frataj vortoj.

Post kunveno kun Majstro Esperanto, Patro kaj Verbum esperplene reiris hejmen. Esperanto promesis liberigi Luman kaj Lumeton konigante al ili la tutan belecon kaj celon de la internacia lingvo kreita de Zamenhof.

Kaj tiel okazis. Sekvatage Lumeto jam havis enmane la Fundamenton de Esperanto kaj feliĉe montris sian trezoron al la amikino Luma. Tiam ĉi tiuj tuj memoris la belan preparolatan Esperanton, kie ĉiuj vortoj estas feliĉaj pro la facila interkomunikiĝo kun aliaj landoj proksimaj aŭ malproksimaj ...

Tiel la ĝojo revenis al la koroj de Luma kaj Lumeto.

Uzante Esperanton ili lernos kaj kunprofitos multe da belaĵoj.

Tiam en alia nemulte malproksima regno, kie floroj, birdoj kaj sorĉistinoj kunvivadas harmonie, Floreto, kiu estas verkistino, longe suspiras malfermante la libron, kie estas la rakonto, kiun ŝi ĵus finverkis.

Nu, kiel ŝi emas konatiĝi, intime, kun tiuj du fratanimoj...

Kiel ŝi deziras lerni la verdan lingvon de frateco! Kaj kiel ili triope ŝatos kreadi ludante kune, ie ajn!

**Maria Nazaré Laroca**

Juiz de Fora, 01/05/2017.

(El Beletra Almanako N-ro 12 (Oktobro 2011))

Fonto:

<http://nazarelaroca.blogspot.com.tr/2017/05/en-la-regno-de-l-senfinaj-mil-unu-vortoj.html>

## Uzeblas sunenergio por aŭtobusoj en Ŝanhajo, Ĉinio

Lastatempe, la unua medi-amika aŭtobusa stacidomo en Ŝanhajo oficiale ekfunkciis ĉe la parkejo Gaoke Xilu en Pudong-Distrikto, Ŝanhajo. Ĉiuj tieaj novenergiaj aŭtobusoj povas esti ŝargitaj per sunenergio en la parkejo.



Laboranto ŝargas aŭtobuson per sunenergio.

sunenergiajn panelojn kun areo de ĉ. 2 mil kvadrataj metroj sur la tegmento de la parkejo, kaj komencis provan funkciadon en oktobro, ĝia ĉiutaga elektra produktokvanto atingas averaĝe 600 kilovattohorojn. Laŭ antaŭsupozo, pere de la ŝparita energio unu aŭtobuso povas veturi plue je pli ol 150 mil kilometrojn tutjare.

Fonto El Popola Ĉinio

[http://www.espero.com.cn/2016-12/21/content\\_39958468.htm](http://www.espero.com.cn/2016-12/21/content_39958468.htm)



La sunenergiaj paneloj instalitaj sur la tegmento de la parkejo kaj aŭtobusoj ŝargataj per sunenergio

En junio de la kuranta jaro, la aŭtobusa firmao instalis

## Tra la mondo fariĝas senpaga

### Germanio kaj Ĉinio kunlaboras por eldoni la revuon

En la 1-a numero de Tra la mondo la redaktejo anoncis ke la revuo estas senpaga al ĉinaj aktivuloj, ke la reta versio por abonantoj estas 6 eŭroj, kaj la papera versio estas 26 eŭrojn jare. Post la apero ni fakte tuj senpage donacis la unuan numeron al ĉiuj legantoj.

Ekde nun, Interkultura Centro Herzberg (ICH) el Germanio kaj Esperanto-Centro Ora Ponto decidas kunlabore eldoni la revuon Tra la mondo.

Post la kunlaboro la du eldonantoj decidas ke la reta versio estas senpaga al ĉiuj kaj havebla ĉe la ligilo: <http://tra-la-mondo.esperanto-urbo.de/>

Nur dezirantoj de la papera versio pagas la bazan koston. Mondonaco por subvencii la eldonadon estas bonvena. Donaĉon ĝiru al la UEA-konto: "ikch-a" kun indiko "donaco al Tra la mondo".

**Bonan legadon al ĉiuj!**

**Peter Zilvar**

Direktoro de Interkultura Centro Herzberg

**Trezoro Huang Yinbao**

Direktoro de Esperanto Centro Ora Ponto



## Lanĉita poŝtelefona aplikaĵo Amikumu!

Estis oficiale lanĉita la poŝtelefona aplikaĵo Amikumu, kiu celas helpi la uzanton trovi kaj kontakti proksimajn homojn, kiuj scipovas specifan lingvon, ekzemple Esperanto. La programo uzas la GPS-aparaton de poŝtelefono por kontroli la pozicion de la uzantoj kaj prezenti liston de plej proksimaj parolantoj de specifa lingvo por faciligi, ke ili renkontu unu la alian kaj amikiĝu.

La aplikaĵo, kiu havas UEA kiel oficiala sponsoro, estas tre ŝatata de esperantistoj de la tuta mondo kaj faciligas la kontakton inter Esperantistoj. Ekzemple dum vojaĝo aŭ eĉ promeno en sia hejmurbo, eblas per Amikumu trovi esperantistojn en la ĉirkaŭaĵoj. Estas du manieroj trovi alian esperantiston (aŭ parolanton de alia lingvo):

1. Per la listo, kiu montras proksimajn esperantistojn ordigitaj laŭ distanco
2. Per mapo, kiu montras proksimajn esperantistojn laŭ la loko, kie ili lastfoje publike deklaris, ke ili estas (ne realtempa, ĉar pro sekurecaj kaj privatecaj kialoj pozicio en la mapo ne aktualiĝas aŭtomate, nur kiam la uzanto volas)

Amikumu estas elŝutebla de uzantoj de Androjdo kaj

iOS. Oficiala retejo de Amikumu (en Esperanto):

<https://amikumu.com/eo/>

En Ĉinio oni povas elŝuti ĝin ĉe

<https://pan.baidu.com/s/1i5FVsl5>

Provu la novan aplikaĵon kaj amikumu!

**Rafael Henrique Zerbetto**

Fonto: [http://www.espero.com.cn/2017-04/25/content\\_40686490.htm](http://www.espero.com.cn/2017-04/25/content_40686490.htm)





## Publika libroŝranko - la mikrolibrejo por ĉiu



**Legi librojn sen aĉeti ilin, sen registri en publika librejo - pludoni librojn nebezonaĵojn al interesitoj... Tiu ĉi ideo pli kaj pli disvastiĝas en kelkaj urboj. Ankaŭ en Poysdorf, Malsupra Aŭstrio/Vinkvartalo (Weinviertel), en kiu ne plu bezonata telefonĉelo fariĝis publika librejo**

senkosta.

Publika libroŝranko estas ŝranko aŭ alia rimedo, ekzemple ne plu bezonata telefonĉelo, por libroj, kiu staras en publika ejo, alirebla por ĉiu homo. Ĝi uzblas por pruntedoni aŭ pruntepreni librojn senpage, anonime kaj sen ia ajn formalajoj. Aliaj nomaj estas: interŝanĝbiblioteko, strata biblioteko, "Bücher-Box" - kaj en la angla "public bookcase", en la franca "microbibliothèque" aŭ en la hispana

"biblioteca libre".

Simila al la ideo de "Bookcrossing" estiĝis en la 1990-aj jaroj en la kadro de arta agado la ideo instalati publikajn libroŝrankojn por subteni la interŝanĝon de literaturo (agadartistoj Clegg & Guttmann). Financitaj de la plej diversaj organizaĵoj ekde tiam pretas specialaj aŭ rekonstruitaj lokoj por ke homoj povas enmeti siajn librojn. Oni rajtas elpreni librojn kaj hejmenporti ilin. Laŭ sia plaĉo ĉiu uzanto decidas, ĉu li raportos, konservos aŭ ŝanĝos la librojn.

Ne kompleta listo pri publikaj libroŝrankoj en germanparolantaj regionoj atingeblas ĉi tie: [https://de.wikipedia.org/wiki/%C3%96ffentlicher\\_B%C3%BCcherschrank](https://de.wikipedia.org/wiki/%C3%96ffentlicher_B%C3%BCcherschrank)

Ankaŭ en la pitoreska urbeto Poysdorf, meze en Malsupra Aŭstrio, troviĝas nun ĉe agrabla sidloko enkadrigita de vinberoj malnova telefonĉelo, en kiu legemuloj povas interŝanĝi librojn - bona okazo por mi enmeti kaj tiel pludoni Esperanto-librojn. Eble la sama eblas ĉe Via loĝloko.

**Uwe Stecher, Vieno, Aŭstrio**

## La nigra katido



Estis agrabla printempa vespero. Amanto kaj amatino promenis sur strateto manĝante sandviĉon.

"Fi! Kiom malbela estas tiu nigra katido!" Kriis la amatino.

"Sed laŭ mi ĝi estas karesinda besto. Mi ŝatas katidojn."

Kontraŭis la amanto.

"Male mi malŝatas ĉiujn nigrajn vivulojn, speciale katojn. Vi ne rajtas ĵeti por ĝi el via sandviĉo. Ĝi sekvos nin se vi tion faros."

La nigra katido miaŭetis kaj rigardis ilin kiuj estis malproksimiĝantaj. Ĝi jam naskiĝis antaŭ kelkaj tagoj kaj ĝia patrino, same tute nigra, lasis ĝin sola kaj iris trovi manĝaĵojn. Ŝi tre malĝoĝiĝis kiam vidis ĝian koloron naskinte sian bebon. Kiel nigra katino ŝi havas multe da problemoj. Unue, preskaŭ neniu homo ĵetas manĝaĵon por nigra kato. Aldone, alikoloraj katoj ankaŭ ne ŝatas nigrajn katojn. Estas

malfacile por ŝi trovi sekskunulon. En la kvartalo kie ŝi vivas, ne ekzistas nigra virkato kaj ne-nigraj virkatoj apenaŭ emas seksumi kun nigra katino!

"Miaŭ! Ĉu via patrino mortis aŭ ŝi estas ne-nigra kaj ŝi forlasis vin por ĉiam?" Demandis griza preterpasanta kato.

"Ne! Ŝi iris trovi manĝaĵojn. Ŝi estas nigra ankaŭ." Respondis la nigra katido.

Estis frua mateno. Ŝoforo hastis ĉar iom malfruiĝis kaj li devis preni ĉiujn lernantojn kaj alporti ilin ĝustatempe al la lernejo. Subite la akra sono de forta bremsado vekis ĉiujn loĝantojn de la strateto. La ŝoforo, ankoraŭ ne bone vekita, ne vidis nian nigran katidon trapasintan la strateton kaj mortigis ĝin sub la radoj de sia aŭto. Li ne haltis ĉar li ne deziris ke la lernantoj vidu la tragedian scenon. La nigra katido komforte dormis eterne sur la asfalto de la strateto kaj ne spertis la malfacilaĵojn de nigraj katoj.

**Keyhan Sayadpour**  
el Irana Esperantisto - Somero 2012 numero 2



### Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi

açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ("-") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Artık basit ekler (fiil, isim, sıfat vs ekleri) için tire kullanmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekler ile yeni birleşik kelimeleri ayırıyoruz.

## GRAMATIKO

lun tagon (ĝi estis mardo), kiam la infanoj alvenis al la lernejo, Fraŭlino Saĝa diris:

"Hodiaŭ vi devas lerni Gramatikon."

Ŝi prenis malgrandan pecon de kreto, kaj skribis per ĝi sur la nigra tabulo:

### *La Verbo. "LUD-I"*

Nuna tempo:	Mi lud-as	Ni lud-as
	Ci lud-as	Vi lud-as
	Li, Ŝi, aŭ Ĝi lud-as	Ili lud-as

"Nu atentu! La Esperanta verbo estas tre simpla," diris ŝi, kaj skribis denove:-

Pasinta tempo:	Mi (Ci, Li, Ŝi, Ĝi, Ni, Vi, Ili) lud-is
Estonta tempo:	Mi (Ci, Li, Ŝi, Ĝi, Ni, Vi, Ili) lud-os
Supozo:	Mi (Ci, Li, Ŝi, Ĝi, Ni, Vi, Ili) lud-us
Infinitivo:	lud-i
Deziro:	lud-u

"Nu Roĝero," ŝi diris, "donu al mi ekzemplon, mi petas."

"Jes mi donos al vi ekzemplon," respondis Roĝero:

"Lastan jaron . . . mi est-is ses-jara.  
Nun . . . . . mi est-as sep-jara.  
Proksiman jaron mi est-os ok-jara."

"Bone, ho, bone! ... Nu, Ŝila, vi donu ekzemplon, mi petas."

"Jes," respondis Ŝila, "mi donos ekzemplon." La musineto pensis momente, tiam ŝi diris:

"Hieraŭ est-is lundo;  
Hodiaŭ est-as mardo;

Morgaŭ est-os merkredo."

"Bone, tre bone," diris la maljuna griza muso. "Nu Johano, vi donu al mi ekzemplon."

"Jes," respondis Johano, "mi donos ekzemplon:

Hieraŭ mi est-is malbona museto;

Hodiaŭ mi est-as malbona museto;

Morgaŭ mi est-os malbona museto."

La aliaj infanoj, kaj la instruistino, ridis laŭte.

"Vi ne estas vere malbona, Johano," diris la instruistino, "vi estas nur petola. Vi amas ludi, kaj vi ne estas tre diligenta. Sed vi estas tre juna. Kiam vi estos granda muso, vi estos bona. Vi faros grandajn truojn en la planko; vi kolektos multan manĝon por via familio; vi estos zorga, kaj ne eniros kaptilon. Ho, jes, tiam vi estos tre bona muso."

Tiam Johano estis tre fiera. "Jes," diris li, "mi faros tre grandajn truojn en la planko; mi kolektos amason da manĝo; mi neniam eniros kaptilon." Ho, Johano estis ja fiera!

Sözlük		kapti	yakalamak	pasinta	geçmiş
		kaptilo	tuzak	pasinta tempo	geçmiş zaman
alveni	gelmek	kiam	Ne zaman?	peco	parça
amaso	bir sürü	kolekti	toplamak	peti	rica etmek
atenti	dikkat etmek	kreto	tebeşir	petola	oyun sever
ci	tekil "sen"... Kullanılmaz... yerine "vi" yani siz kullanılır	lasta	son	planko	döşeme
deziro	istek	lasta jaro	geçen sene	proksima	yakındaki
diligenta	çalışkan	laŭte	yüksek sesle	proksima jaro	yakın yıl, gelecek
eniri	girmek	manĝo	yiyecek		sene
estonta	gelecek	momente	bir dakikalığına	simpla	basit
estonta tempo	gelecek zaman	morgaŭ	yarın	supozo	varsayım
fiera	gururlu	multa	çok	truo	delik
hieraŭ	dün	nu	hmm, şimdi, iyi	verbo	fiil
hodiaŭ	bugün		(ingilizce'deki "well")	vere	gerçekten
infinitivo	sonsuzluk, mastar formu	nuna	şimdiki	zorga	dikkatli
		nuna tempo	şimdiki zaman		

#### Ekler:

-il- bir kökten alet yaratır, kapti=yakalamak, kaptilo=tuzak

#### Dilbilgisi:

Esperanto'da basit fiil zamanları çok basittir. Daha komplike zamanları ifade etmek için ulaçlar ve ortaçlar kullanılır.

Basit zamanlar ve ekleri şunlardır

<b>Şimdiki zaman</b>	-as	Mi iras (gidiyorum)
<b>Geçmiş zaman</b>	-is	Mi iris (gittim)
<b>Gelecek zaman</b>	-os	Mi iros (gideceğim)
<b>Dilek/istek/emir formu</b>	-u	iru! (git!)
<b>Varsayım formu</b>	-us	Mi irus.... (Giderdim...)
<b>Mastar formu</b>	-i	iri (gitmek)



En MONA regiono estas ĉefe 24 landoj kaj 7 lingvoj (araba, armena, azerbajĝana, hebrea, kartvela, persa kaj turka). Nur en tri landoj estas asocioj: Irano, Israelo kaj Kartvelio, kaj en Turkujo estas relative forta grupo de esperantistoj. Sed en la aliaj landoj de la regiono la nombro de Esperanto-parolantoj estas tre malmultaj.

relative simplaj artikoloj, kaj plue infromi Esperanto-agadojn al la regiono kaj la tuta Esperantujo.

Jen la ligilo de la nova retejo:  
<https://monainformado.wordpress.com/>

>>> Bonvolu aliĝi al la retejo per via retpoŝtadreso uzante la formulareton en la dekstra flanko por ricevi anoncojn pri novaj artikoloj.

La retejo ĉefe celas diskonigi Esperanton al neesperantistoj en la regiono, per dulingvaj kaj

**Kapaniŝ - Fermo**




Ĝuste Haziran sayımızın sonuna geldik.

Umuyoruz ki sunduğumuz yazılardan en azından bir kaçını okumuş ve beğenmişsinizdir.

Hatırlayın ki okumadan öğrenmeye çalıştığınız dili geliştirmeniz mümkün değildir.

Sonraki sayımızda görüşmek üzere

***Hoşçakalın !***




Jen! ni estas en la fino de nia junia numero.

Ni esperas, ke vi almenaŭ legis kelkajn el la verkaĵoj ni prezentis al vi kaj vi ilin ŝatis.

Memoru, ke sen legado oni ne povas plibonigi la lingvon oni lernas.

Ĝis revido en nia venonta numero.

***Ni adiaŭas vin !***



*Solvo de la krucvort-enigmo*

O	I	R	S		O	N	A	B	L	I	10
I	D	O	R	A	P	I		O	K		9
B					O	E	L	A	S	R	8
											7
A		O	N	A	R	I		L	T		6
											5
		U	H	E		T		O	R	O	4
											3
											2
		U		A	L	A	E	G	A	M	1
											12
											11
											10
											9
											8
											7
											6
											5
											4
											3
											2
											1